

Filono el Aleksandrio

Pri la kreo de la mondo laŭ Moseo

Φίλων ὁ Ἀλεξανδρεύς

Περὶ τῆς κατὰ Μωυσέα κοσμοποιίας

el la Greka tradukita de Gerrit Isai Berveling

en danko memoro pri D-ro J. C. M. van Winden





Profesoro D-ro Jacobus Cornelis Maria van Winden OFM (1922-2013) 1988

Fontoj:

Les œuvres de Philon d'Alexandrie
volume 1: De opificio mundi
Éditions du Cerf, Paris 1961

Philo van Alexandrië
Περὶ τῆς κατὰ Μωυσέα κοσμοποιίας / De opificio mundi
De schepping van de wereld volgens Mozes
Vertaling door¹ J. C. M. van Winden
Utrecht 1996
Presprovaĵo el la t.n. C. J. de Vogelleerstoel²
Fakgrupo Historio de la Filozofio
Fakultato de Filozofio
Ŝtata Universitato Utreĥto³

El la nederlanda versio estas prenitaj ankaŭ la intertitoloj.

En la interreto:

greke:

https://el.wikisource.org/wiki/Περὶ_τῆς_κατὰ_Μωυσέα_κοσμοποιίας

angle:

<https://www.earlychristianwritings.com/yonge/book1.html>

germane:

https://de.wikisource.org/wiki/Ueber_die_Weltschöpfung/Text

Gerrit Berveling finis la tradukon al Esperanto en marto 2025.

Ne tradukitaj estas la numeroj 91-127.

Vidu la klarigon post numero 90.

Provlegis kaj aranĝis: Albrecht Kronenberger.

Metis en la portalon KRISTANAJ FONTOJ: Albert Josef Urban.

¹ = traduko de.

² = Vogel-katedro.

³ Persone transdonita de Profesoro van Winden al Gerrit Berveling.



Filono el Aleksandrio

Pri la kreo de la mondo laŭ Moseo

Enkondukaj konsideroj

Admirinda komenciĝo

1 Inter la leĝofarintoj kelkaj sen ia beligado kaj nude dismetis, kion ili opiniis justa, aliaj enplektante siajn ideojn inter amaso da vortoj por mistifiki la homojn tiel kovris la veron sub ĉiaj elpensitaj rakontoj.

2 Sed Moseo konsideris la unuan metodon nepripensita, tro facilanima kaj nefilozofia, la duan mensoga kaj trompoplena. Ambaŭ metodojn li

venkis, donante al siaj leĝoj tre belan kaj eminentan komencon. Li ne tuj komencis per dismetado, kion oni devas fari kaj kion ne, sed, kredante, ke necesas unue instrui la estontajn uzantojn de la leĝoj, li ankaŭ ne venis kun rakontoj mem-elpensitaj nek aprobis elpensaĵojn de aliaj homoj.

3 Kiel mi jam diris, tiu ĉi komenco altgrade estas admirinda; ĝi enhavas rakonton pri la kreo; la ideo ĉe tio estas, ke la kosmo harmonias kun la leĝo kaj la leĝo kun la kosmo, kaj ke la viro, kiu vivas laŭ la leĝo, estas per tio mondĉivitano, ĉar sian agadon li direktas laŭ la leĝo de la naturo, kiu identas je la ordo de la tuta kosmo.

4 La belecon de la pensoj, kiuj troviĝas en la historio pri la kreo, neniu – nek poeto nek prozisto – povos inde prihimni; ili superas vorton kaj orelon, ĉar ili estas tro grandaj kaj tro altaj por la komprenkapablo de kiu ajn mortidevulo. **5** Sed tio ne estas kialo silenti pri tio. Ne, por plaĉi al Dio, ni devas kuraĝi ekparoli, eĉ se niajn fortojn tio superas. Niaj paroloj ne estos tiaj, ke la realon tian, kia ĝi estas, ili esprimas, sed ili prezentas nur kelkajn aferojn el la multo, kiun atingos la homa pensado, kiam ĝi estos kaptita de la amo kaj la emo al ĝi. **6** Ĉar kiel eĉ la plej eta sigelo povas enhavi la bildon de aferoj gigante grandaj, kiam tie ili estas cizelitaj, tiel same eble la beleco de la historio pri la kreo, beleco kiu blindumas la animojn de la legantoj per sia radiado, povos esti skizita per desegno de modestaj dimensioj. Sed unue devas esti menciita tio, kio ne povas resti nemenciita.

La mondo ne estas nekreita

7 Apenaŭ ekzistas homoj, kiuj, ĉar ili pli admiris la mondon ol la Kreinton, asertas, ke ĝi estas sen komenco kaj eterna; per tio Dion ili malhonoris kaj atribuis al Li kontraŭ la vero grandan neagemon; dum fakte oni devus havi grandan admiron pri Lia potenco kiel Farinto kaj Patro kaj devus doni al la mondo ne pli grandan honoron ol estas prave. **8** Sed Moseo, kiu ascendis ĝis la plej altaj ŝtupoj de la filozofio kaj estis instruita per Dia revelacio pri la granda tutaĵo de la fundamentaj principoj de la naturo, bone komprenis, ke estas afero de rekta neceso, ke unuflanke en la aĵoj enestas aktiva principo sed aliflanke ankaŭ pasiva objekto; kaj ke la

aktiva principo estas la animo de ĉio, je plej alta ŝtupo pura kaj nemiksita, levita alte super virto, super scienco, ja eĉ super la bono mem kaj la belo mem; **9** kaj ke el si mem la pasiva principo estas sen animo aŭ movo sed, movate de la animo kaj formita kaj animita, ĝi ŝanĝiĝis en la plej perfektan agon, kiu estas ĉi tiu mondo. Kiuj diras, ke ĝi estas neestiĝinta, tiuj, sen konsciiĝi pri tio, forprenas la plej gravan kaj plej necesan kialon de la pieco, la providencon. Ĉar memevidente la Patro kaj Farinto estas zorgema pri tio, kion Li estigis. **10** Ĉar patro strebas al la saviĝo de siaj infanoj kaj konstruisto al la pluekzistado de sia konstruaĵo; kaj ĉion nocan aŭ malutilan li ĉiurimede forigas, kaj li faras sian plejblon por havigi ĉion, kio estas utila aŭ pozitiva. Kun tio, kion li ne faris, la farinto sentas neniun ligitcon. **11** Estas do opinio senvalora kaj noca nomi tiun ĉi mondon urbo, en kiu regas anarĥio, ĉar ĝi ne havus reganton aŭ estron aŭ juĝiston, kiu regus aŭ ordigus ĉion. **12** Sed Moseo, tiu granda pensulo, konsciis, ke la neestiĝinta estas io tute malsama ol tio, kion per niaj okuloj ni povas percepti. Ĉar ĉio perceptebla troviĝas en estiĝado kaj ŝanĝiĝo kaj neniam restas la sama. Al la nevidebla, noeta⁴, li do atribuis kiel parenkan kvaliton la eternecon, kaj al la perceptebla kiel taŭgan li donis la nomon estiĝo. Nu, ĉar ĉi tiu mondo estas videbla kaj perceptebla per niaj sensoj, neeviteble ĝi ankaŭ devas esti estiĝinta. Tial prave ties estiĝon li priskribis⁵, ĉe kio tre inde li parolas pri Dio.

Kreado en ses tagoj, kvankam sentempa

13 Kiam li diras, ke la mondo kreiĝis en ses tagoj, tio ne estas, ĉar la Kreinto bezonis certan spacon da tempo; ĉar estas memevidente, ke Dio kreis ĉion samtempe; kaj ĉe tio ne nur sufiĉis Lia ordono, sed eĉ Lia penso. Ne, tio estas ĉar tio, kio tie estiĝis, bezonis ian ordon. Nu, ĉe ordo apartenas nombro; nu, el la nombroj, laŭ la leĝoj de la naturo, 6 estas la nombro, kiu plej rilatas al estiĝado. Ĉar el la nombroj post 1 ĝi estas la unua perfekta nombro, ĉar ĝi estas identa je la produto de ĝiaj eroj kaj formas ties sumon, nome de 3 kiel la duono, 2 kiel triono kaj 1 kiel sesa ero. La nombro 6 estas, se tiel diri, ankaŭ nature vira kaj ina kaj formas

⁴ Neologismo. Greke: νοητός = ekzistanta ne en sense perceptebla formo, sed – kiel ideo – en la menso de la pensanto.

⁵ en Genezo (= estiĝo).

harmonian kunigon de la forto de ambaŭ. Ĉar la nepara estas en la aĵoj la vira elemento, la para la ina. La unua nepara nombro estas 3, la unua para nombro 2; ilia produto estas 6. **14** La mondo, estante la plej perfekta el ĉio estiĝinta, devis konstruiĝi laŭ la plej perfekta nombro, nome 6; kaj ĉar ĝi devis esti la teatro de la estiĝo per sekskuniĝo, ĝi devis formiĝi laŭ la unua nombro, kiu estas kuniĝo de nepara kaj para, kaj tiel en si kombini la ideon de la vira, kiu donas la semon, kaj de la ina, kiu ĝin ricevas.

Tago unu

15 Al ĉiu el tiuj tagoj li atribuas parton de la ĉiomo, sed la unuan tagon li apartigas. Tiun tagon li mem ne nomas ›unua‹, por preventi, ke ĝi estos kalkulita kun la ceteraj, sed li nomas ĝin trafe ›tago unu‹; li vidis en ĝi la naturon de la unuo kaj tial ĝin nomis tiel.

La noeta realo

Kion enhavas tiu tago, kiom eble ni devas klarigi; ĉar klarigi ĉion estas neeble. Ĝi ja enhavas kiel ion de unika naturo la noetan mondon, kiel diras la teksto, kiu klarigas ĉi tiun tagon. **16** Ĉar Dio, ĝuste ĉar Dio li estas, antaŭvidis, ke bela bildo ne povas estiĝi sen bela ekzemplo, kaj ke nenio sense perceptebla estus senriproĉa, se ĝi ne estus formita laŭ pramodelo de noeta karaktero. Tial, kiam ĉi tiun videblan mondon Li estis kreonta, unue Li formis la noetan mondon, por tiel, uzante senmaterian kaj Di-similan ekzemplon, formi la palpeblan materian mondon, kiel pli junan bildon de la pli olda, kiu enhavus tiom da palpe percepteblaj specioj, kiom estas en tiu unua noeta mondo.

La bildo de l' arkitekto

17 Pri tiu mondo, kiu konsistas el la ideoj, oni ne povas diri aŭ pensi, ke ĝi troviĝas en iu loko. Ĝian estmanieron ni povos kompreni laŭ ekzemplo el nia spertata mondo. Kiam urbo estas fondota, ĉar estas iu tre malavara reĝo aŭ guberniestro, kiu disponas pri senlima potenco kaj samtempe havas tre indan karakteron kaj volas aldoni pompon al sia prospero, tiam povas okazi, ke tie sin anoncas kvalifikita arkitekto; li rigardas, ĉu klimato aŭ situo de la loko estas ĝustaj, kaj tiam unue li

skizas en siaj pensoj pli malpli ĉiujn detalojn de tio, kio devos formi la estontan urbon: temploj, gimnazioj, magistratanaĵoj, grandaj placoj, havenoj, ŝipfarejoj, stratoj, la plano de la muroj, la loko, kie devos veni loĝejoj kaj aliaj publikaj konstruaĵoj. **18** Kaj kiam, kvazaŭ en vakso, en sia animo la bildon de ĉiuj tiuj aferoj li fiksis, en si mem li portas iun noetan urbon. Per la natura memoro, kiu en li naskiĝis, li revokas la bildojn en si, kaj ties liniojn li pli akre cizelas en sian animon, kaj, kiel bona fakulo, rigardante la ekzemplon, li komencas konstrui la urbon el ŝtono, briko kaj ligno, ĉe kio la konkretajn aferojn li formas laŭ la ekzemplo de la nemateriaj ideoj. **19** Ion tian ni ankaŭ imagu rilate al Dio: ke, kiam la planon Li ekhavis krei la grandan mondo-urbon, unue en sia menso Li elpensis ĝiajn formojn; poste Li konstruis noetan mondon, kaj poste Li ankaŭ faris la percepteblan mondon, ĉe kio la noetan Li uzis kiel ekzemplon.

La Dia Logoso en la kreo

20 Same kiel la urbo, kiu unue formiĝis ĉe la arkitekto, ne havis lokon en la ekstera mondo, sed estis cizelita en la animo de la artisto, same tiel la mondo, kiu konsistas el la ideoj, ne havis alian lokon ol la Pensadon⁶ de Dio, kiu formis tiujn ideojn. Ĉar kiu alia loko estus por Liaj fortoj, kiu kapablas enhavi pure – mi ne diras ĉiujn, sed eĉ nur unu, kian ajn, – kaj prezenti spacon al ĝi? **21** Krome ankaŭ ekzistas forto, kiu estas krea kaj havas kiel fonton la vere bonan. Ĉar se iu volas esplori la kaŭzon, pro kiu ĉio ĉi estas kreita, tiam mi pensas, ke li ne mistrafas la veron, se li diras, kion ajn dirus la malnovuloj, ke la Patro kaj Farinto estas bona; tial Li ne enviis sian propran bonecon al estaĵo, kiu el si mem havis nenion bonan sed estis kapabla fariĝi ĉio. **22** Ĉar el si mem ĝi estis neordigita, senkvalita, senanima, senkohera, sed tre malhomogena, malharmonia kaj malagorda; sed ĝi ŝanĝiĝis kaj fariĝis la malo kaj bonega: ordo, difiniteco, inspiriteco, harmonio, identeco, belsono, ĉio kio estas subluma.

La Dia bono en la kreo

23 Sen ia konsilanto – ĉar kiu estus krom Li mem? –, nur konsultinte sin mem, Dio sciis, ke tiun naturon, kiu sen Dia helpo ne povas atingi ian

⁶ la Parolo, la Logoso.

bonecon, Li devas superŝuti per amasaj kaj riĉaj donoj. Siajn bonfarojn tamen Li ne disdonas laŭ la mezuro de siaj propraj donoj – ĉar tiuj estas nemezureble grandaj kaj senfinaj –, sed Li adaptas tiujn al la kapablo de tiuj, kiuj ilin ricevas. Ĉar ne estas tiel ke, laŭ la mezuro kiel Dio kapablas fari bonon, tiel same la estiĝanta estus kapabla ricevi bonfarojn; ĉar la fortoj de Dio estas ekstreme grandaj, sed la estiĝanta ja estas tro malforta ol ke ĝi povus akcepti tiujn grandajn donojn, kaj ĝi rifuzus ilin, se Li ne al ĉiu mezurus kaj atribuis la konvenan parton laŭ ĉies kapablo. **24** Se esprimi per simplaj vortoj, oni povus diri, ke la noeta mondo estas nenio alia ol la Logoso⁷ de Dio ĝuste en ties krea aktiveco. Ĉar ankaŭ la noeta urbo estas nenio alia ol la pensado de la arkitekto ĝuste dum li intencas fondi la urbon. **25** Tio estas la opinio de Moseo, ne simple io, kion mi elpensis. Ĉar kiam en la sekvo li priskribas la estiĝon de la homo, li emfaze deklaras, ke tiu estas kreita laŭ la bildo de Dio. Nu, se la parto⁸ estas bildo de bildo, tiam kompreneble antaŭ la tuto estas tia. Sed se tiu ĉi tuta sense perceptebla mondo, kiu estas pli granda ol la homo, estas bildo de Dia bildo, tiam estas klare, ke la origina sigelo, kiel la noetan mondon ni nomas, estas la Logoso⁹ de Dio mem; tiu ĉi estas praekzemplo kaj ideo plej eminenta.

Klarigo pri la teksto

›Unu tago‹ (Genezo 1:1-5): Kreo de la lumo

Komenco: ne en la tempo

26 Nu, li¹⁰ diras: *En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron*¹¹. Ĉe tio li ne, kiel faras kelkaj, konsideras la komencon kiel komencon en la tempo. Ĉar antaŭ ol estis la mondo, tempo ne estis; ĉi tiu do aŭ samtempe kun ĝi estiĝis aŭ post ĝi. Tempo ja estas la daŭro de la moviĝo de la mondo, kaj la moviĝo ne povas esti antaŭ ol estas tio, kio moviĝas, sed

⁷ la Pensado.

⁸ = la homo.

⁹ la Pensado.

¹⁰ = Moseo.

¹¹ Genezo 1:1.

neeviteble ĝi devas estiĝi poste aŭ samtempe kun la moviĝanta. Tial estas necese, ke ankaŭ la tempo estas same aĝa kiel la mondo aŭ pli juna ol ĝi. Kiu kuraĝas aserti, ke ĝi estas pli aĝa, tiu agas nefilozofe.

Komenco = kiel unua

27 Se do komenco tie ĉi ne estu komprenata kiel komenco en la tempo, estas verŝajne, ke ĝi estas uzata nombre. ›Li kreis en la komenco‹ do signifas same kiel ›Li faris kiel unuan‹ la ĉielon. Ĉar estas ja memkompreneble, ke la ĉielo kiel unua venis al ekzistado; ĝi ja estas la plej eminenta inter la kreaĵoj, ĉar ĝi estu ja la plejsankta loĝejo de la Dioj, kiujn per niaj sensoj ni perceptas. **28** Ĉar se eĉ estas tiel, ke la Kreinto ĉion samtempe faris, ja estis ordo en la bela kreo, ĉar en malordo nenio estas bela. Ordo signifas sinsekvon kaj okazadon unu post alia de aferoj, kiuj estas unuaj kaj duaj, aŭ en la plenumiĝo, aŭ minimume en la pensoj de la realigantoj; ĉar nur tiel ili havus precizecon sen vojerari aŭ esti en konfuzo.

Realo senmateria

29 Unue do la Kreinto faris senmaterian *ĉielon* kaj nevideblan *teron* kaj la ideon de la aero kaj de la malpleno; el ĉi tiuj ambaŭ unu Li nomis *mallumo*, ĉar la aero laŭnature estas nigra, la alian *abismo*, ĉar la malpleno estas oscedanta profundo. Poste Li faris la nevideblan realaĵon de la *akvo*, kaj de la *spiro*¹², kaj fine kiel sepan tiun de la *lumo*. Ankaŭ ĉio ĉi estis senmateria kaj la noeta ekzemplo de la suno kaj de ĉiuj lumantaj steloj, kiuj stariĝos sur la ĉielo.

30 Tiuj spiro kaj lumo ricevis specialan honoron, ĉar la unuan li nomis ›de Dio‹, ĉar la spiro specife estas vivdona kaj Dio estas la fonto de la vivo. Pri la lumo specife li diras, ke ĝi estas ›bela‹; ĉar, mi kredas, la noeta lumo estas tiom pli brila kaj bela ol la videbla <lumo>, kiom la suno en brilo superas la mallumon kaj la tago la nokton, kaj kiom la spirito, kiu ordonas pri la tuta animo, estas pli klara ol la okuloj de la korpo. **31** La nevidebla, noeta lumo estas bildo pri la Dia Logoso, kiu ĝian estiĝon konigis. Ĝi estas la superĉiela stelo, kiu estas la fonto de la percepteblaj

¹² la pneŭmo.

steloj; ĝin oni povus nomi la »tut-brilo«. El ĝi ĉerpas la suno, la luno kaj la ceteraj planedoj kaj la fiksitaj steloj, ĉiuj laŭkapable, la lumon, kiu decas al ili. Estas ja tiel, ke la nemiksita pura brilado estas malfortigata, kiam de noeta al videbla ĝi komencas transiri; ĉar el la videbla nenio estas tute pura.

Mallumo kaj lumo, vespero kaj mateno

32 Tute pravas ankaŭ la diro: *Mallumo estis super la abismo*¹³. Ĉar certasence la aero estas super la malpleno; ĉar ĝi eniris kaj plenigis tutan la egan, solecan, vakuan spacon, tutan tiun spacon, kiu etendiĝas de la regionoj de la luno ĝis ni. **33** Sed post la ekbruligo de la noeta lumo, kiu estis kreita antaŭ la suno, retiriĝis ĝia kontraŭulo, la mallumo, ĉe kio Dio, kiu konas iliajn kontraŭajn naturojn kaj la batalon, kiun laŭnature ili batalis, ilin disigis unu disde la alia, kaj al ĉiu indikis propran lokon. Por ke ili do ne kontaktiĝu kaj ekbatalu kaj regu milito anstataŭ paco, la ĥaoson Li kondukis en ordon; Li dividis ne nur lumon kaj mallumon, sed Li ankaŭ faris limon meze en la intera spaco, tiel ke Li preventis, ke ambaŭaj limoj sin tuŝu. Ĉar se ili estus najbaroj, per sia batalo pri la superregado ili kaŭzus konfuzon; ili trafiĝus en grandan senfinan rivalecon, se ne estus klare fiksitaj limoj inter ili por disteni ilin kaj preventi reciprokajn konfliktojn. **34** Jen do la *vespero* kaj la *mateno*, ĉe kio la laste menciita indikas la baldaŭan leviĝon de la suno, kiu iom post iom la mallumon forpelas, dum la vespero aperas ĉe la malleviĝo de la suno kaj senprobleme akceptas la formiĝantan mallumon. Ankaŭ ambaŭ ĉi tiujn, mi celas matenon kaj vesperon, ni komprenu kiel senmateriajn, noetajn. En si absolute nenion ili havas sense percepteblan, sed en ili ĉio estas nura ideo, bildo, modelo, sigelo; senmateriaĵoj, kiuj estu por ke estiĝu aliaj, la materiaj aĵoj.

Tago unu

35 Kiam do estis kreita la lumo kaj cedis la mallumo, kaj kiel limoj de la inter ili troviĝanta spaco la vespero kaj la mateno estis kreitaj, neeviteble kun tio estiĝis tempomezuro, kiun la farinto do ankaŭ nomis tago; kaj li

¹³ Genezo 1:2

ne nomis ĝin unua tago, sed *tago unu*, pro la unikeco de la noeta mondo, kiu posedas la naturon de la unuo.

36 Per tio la nemateria mondo estis kompleta; ĝi staris konstruita en la Dia Logoso; kun ĝi kiel ekzemplo formiĝis la perfekta staturo de la sense perceptebla mondo.

›La dua tago‹ (Genezo 1:6-8): Kreo de la mondo

Kiel unuan parton de tio, kio samtempe do estu ankaŭ la plej eminenta, la Kreinto faris la ĉielon, kiun laŭverece Li nomis la *firmamento*¹⁴, ĉar ĝi estas materia; ĉar kio estas materia, laŭnature estas firma, kaj ĝi ankaŭ estas tridimensia; en kio alia oni ja kaptu la firman kaj ŝtofan se ne en la ĉiufanken etendiĝanta? Prave Li do tiun sense percepteblan, ŝtofan ĉielon nomis *firmamento*, per tio metante ĝin kontraŭ la noeta kaj senmateria. **37** Tuj poste Li ĝin nomis *ĉielo*¹⁵, nomo kiu estas trafa kaj tute ĝusta, ĉu ĉar ĝi estas la limo¹⁶ de ĉiuj aĵoj, ĉu ĉar ĝi estas kreita kiel unua de ĉiuj videblaj aĵoj¹⁷. Post ties kreiĝo Li parolas pri dua tago, ĉar al la ĉielo pro la indeco kaj honoro, kiujn en la sensebla mondo ĝi havas, Li volis atribui la spacon de kompleta tago.

›La tria tago‹ (Genezo 1:9-13): Kreo de la tero kaj ĝiaj kreskaĵoj

38 Ĉar nun disŝutiĝis ĉiu akvo sur la tuta mondo kaj penetris en ĉiujn ĝiajn erojn, same kiel se spongo plensuĉiĝis je humido, kaj tiel do estiĝis kloakoj kaj profundaj marĉoj, ĉar ambaŭ elementoj senorde kaj senforme kunamasiĝis kaj miksiĝis kvazaŭ pasto, Dio do post tio ordonis, ke la akvo, kiom sala ĝi estas kaj por kreskaĵoj kaj arboj do estos kaŭzo de malfekundeco, kunfluiĝu el la poroj de la tuta mondo kaj unuiĝu, kaj ke videbliĝu la sektero. La dolĉa humido je ĝia saviĝo postrestis. Ĉar, se en la ĝusta mezuro, la dolĉa akvo estas ilo por kunigi la malsamajn elementojn. Ĝi ankaŭ devis preventi, ke la tero tutaĵe elsekiĝu kaj per tio fariĝu seninfana kaj senfrukta, kaj por zorgi, ke kiel patrino ne nur unu formon de nutraĵo ĝi donu, la manĝaĵon, sed kiel bona patrino ĝi donu al

¹⁴ = la forta, la solida.

¹⁵ = ouranos.

¹⁶ = oros.

¹⁷ = orata.

ĉiuj infanoj ambaŭ, manĝaĵon kaj trinkaĵon. Tial al ĝi Li donis amason da vejnoj, kiuj similas al cicoj, kiuj, se ili malfermiĝos, fluigos riverojn kaj fontojn. **39** Same la nevideblajn vejnojn kun humido en ili Li estigis sur la tuta fekunda tersurfaco por esti en tio ĝiajn abundajn fruktojn.

Aranĝinte ĉion ĉi Li donis al ĉio nomojn: la sekteron Li nomis *tero*, kaj disigitan akvon *maro*.

40 Poste al la *tero* Li komencis doni ĝian ornamon. Ĉar kreskaĵojn, verdaĵon kaj spikojn Li ordonis al ĝi porti kaj ĉiaspecajn plantojn kaj tutajn valojn plenajn je herbo, kaj krome ĉion, kio funkciis kiel nutraĵo por la brutaro aŭ por nutri la homojn. Krome Li kreskigis ĉiujn specojn de arboj; neniu Li forgesis, nek de la sovaĝaj nek de la tiel nomataj malsovaĝaj specoj. Ĉiuj arboj ĉe sia unua estiĝo estis tuj riĉe ŝarĝitaj je fruktoj, malsame ol tio nun okazas.

41 Ĉar nun en la kreskado unu okazas post la alia, ne ĉio samtempe. Ĉar kiu ne scias, ke unue oni havas la semadon kaj plantadon, due la kreskadon de la semitaĵo kaj de la plantaĵo; parte tiu kreskado okazas suben kaj dissendas radikojn kiel iaspecan fundamenton, parte supren, ĉe kio la kreskaĵo leviĝas supren kaj igas formiĝi la trunkon. Poste aperas la ŝosoj kaj disvolviĝas la folioj kaj fine la kreskaĵo portas sian frukton. Kaj ankaŭ la frukto ne tuj plenkreskas, sed konas plurajn ŝanĝiĝojn, same laŭkvante, laŭ grandeco, kiel laŭkvalite, t.e. en ĝiaj multaj aspektoj. Ĉar komence la frukto similas je nedivideblaj polvetoj apenaŭ percepteblaj pro ilia eteco; facile oni povus nomi ilin la unuaj sense percepteblaj aferoj. Poste, kreskante je grandeco, ĝi venas al plena maturiĝo; tio okazas dum malrapida procedo kaj estas la rezulto de la nutraĵo, kiu alportiĝas kaj kiu provizas la arbon je akvo, kaj per la ĝusta miksado de la ventoj, kiuj formas la bonfaran rezulton de la kombino de malvarmaj kaj varmaj aerblovoj. Kun la grandeco ŝanĝiĝas ankaŭ la ekstera aspekto de la frukto; estas kvazaŭ la fakscia mano de pentristo daŭre lerte ornamas ĝin per aliaj koloroj.

42 Ĉe la unua ekesto de la universo, kiel mi jam rakontis, Dio igis la tutan plantomondon leviĝi el la *tero* en plenkreska stato; iliaj fruktoj estis ne malsufiĉe kreskintaj sed maturaj; ili estis pretaj por tuj esti uzataj kaj ĝuataj de la estaĵoj, kiuj baldaŭ vidos la vivon. **43** Li do ordonis al la *tero*

kreskigi tion. La tero estis kvazaŭ virino, kiu longe jam estis graveda kaj en naskospasmoj; ĝi do produktis ĉiujn ĉi sennombrajn specojn de plantoj kaj arboj kaj same fruktojn. Sed tiuj fruktoj ne nur estis nutraĵo por vivantaj estuloj, sed ankaŭ formis materialon por la daŭra estiĝado de similaĵoj; ili ja enhavis la semojn, en kiuj jam ĉeestis neklare kaj nevideble la esencaj ecoj de ĉiuj tiuj plantoj; en la daŭro de la tempo tamen ili fariĝas klaraj kaj videblaj. **44** Ĉar Dio volis, ke la naturo cirkle moviĝu; tiel Li volis fari la specojn senmortaj kaj igi ilin partopreni eternecon. Tial la komencon Li igis rapide kurbiĝi al iu fino kaj tiun finon ree kurbiĝi al komenco. Ĉar el la plantita venas la frukto, kiel fino el komenco, kaj el la frukto la semo, kiu ree en si havas la planton, kiel komencon el iu fino.

›La kvara tago‹ (Genezo 1:14-19): Kreo de la ĉielo

Kial la ĉielo post la tero?

45 En la kvara tago post la tero Dio aranĝis la ĉielon kaj ornamis ĝin. Ne estis, ke la ĉielon Li volis postponi post la tero, ke al la malpli grava estaĵo¹⁸ Li donis antaŭecon kaj al la pli sublima kaj pli Dia Li cedis nur la duan lokon. Tion Li faris por klare montri la forton de sia potenco. Ĉar Dio antaŭvidis, kiel estos la pensoj de la homoj, kiuj tiutempe ankoraŭ ne estis kreitaj; kiel ili estos atentaj pri tio, kio ŝajnas esti vera kaj fidinda kaj en kio multo ŝajnas esti akceptebla, sed ne pri la pura vero; kaj ke ili pli fidus pri la fenomenoj ol pri Dio kaj ke ili havos pli da admiro pri ruzaj rezonadoj ol pri saĝeco; kaj krome kiel ili perceptos la vojojn de suno kaj luno, kiuj kaŭzas somerojn kaj vintrojn kaj la solsticojn de printempo kaj aŭtuno, kaj tiam opinios, ke la ĉirkaŭirado de la steloj en la ĉielo estas la kaŭzo de ĉio, kio ĉiujare kreskas kaj aperas el la tero. Do por preventi, ke, ĉu el senhonta trokuraĝo aŭ el ekstrema senscio, la homoj atribuos al iu kreitaĵo la unuan originon,

46 Li diras: Ili reiru enpense al la unua estiĝo de ĉio, kiam, antaŭ la kreo de suno kaj luno, la tero ja portis ĉiaspecajn kreskaĵojn kaj fruktojn; kaj tiam, tion pripensinte, ili kovu la esperon, ke laŭ ordono de la Patro tiujn denove ili portos laŭ Lia deziro, sen ke ĉe tio helpon Li bezonos de siaj

¹⁸ la tero.

idoj ĉe la ĉielo, al kiuj certan forton Li ja cedis, sed ne aŭtonomion. Ĉar same kiel la ĉarkondukisto tenas la bridojn, kaj la stiristo la direktilon, tiel Li gvidas ĉion laŭ sia leĝo kaj justo tiudirekten kiel Li volas, ne bezonante ies helpon. Ĉar por Dio ĉio estas ebla.

47 Tio estas la kaŭzo, kial la tero unue kreskigis fruktojn kaj sin per verdo ornamis.

La nombro kvar

Krome la ĉielon ordigis perfekta nombro, la 4, kiun oni same bone povas nomi deirpunkto aŭ fonto de la 10, kiu havas la plej altan perfektecon. Ĉar kio estas la 10 envere, tio estas, ŝajne, la 4 en ebleco. Ĉar se la nombrojn 1 ĝis 4 oni metas vice, ili produktas la 10; tiu metas limon al la senfineco de la nombroj, kiuj ĉirkaŭ la 10 kvazaŭ ĉirkaŭ turnopunkto sin turnas kaj kunruliĝas.

48 La 4 ankaŭ entenas la rilatojn de la muzikakordoj, de la kvarto, la kvinto, la okto kaj la duobla okto, el kio konsistas la plej perfekta sistemo. La rilato de la kvarto estas $1 \frac{1}{3}$ rilate al 1, tiu de la kvinto estas $1 \frac{1}{2}$, tiu de la oktavo 2, tiu de la duobla oktavo 4. La 4 entenas ĉiujn ĉi rilatojn, $1 \frac{1}{3}$ en la rilato 4:3, $1 \frac{1}{2}$ en la rilato 3:2, 2 en la rilato 2:1 aŭ 4:2, 4 en la rilato 4:1.

49 Ankaŭ alia tre mirinda eco de la 4 estas menciinda kaj konsiderinda. Estas la unua nombro kiu referencas al la naturo de la solida; la antaŭaj nombroj rilatas al la nemateriaj aferoj. Kun la 1 samvaloras, kio en geometrio nomiĝas la punkto; kun la 2 la linio, ĉar per la elfluado de la 1 estiĝas la 2, per la elfluado de la punkto la linio. Linio estas longo sen larĝo; se aldoniĝas larĝo, estiĝas edro, kiu formiĝas laŭ la nombro 3. Por ekhavi la naturon de la solido, la edro bezonas ankoraŭ unu dimension, la profundon; kiam tiu aldoniĝas al la 3, estiĝas la 4. En tio kuŝas la granda signifo de ĉi tiu nombro; ĝi nin kondukas de la senmateria, la noeta realo al la kompreno de la tridimensia materia mondo, kiu estas la unua, kiun per niaj sensoj ni perceptas. **50** Kiu ne komprenas la ĉi tie diritan, tiu ĝin komprenos, pensante pri tre konata ludo. Kiuj faras la nüksoludon, tiuj kutimas meti tri nuksojn sur ebena grundo, kaj unu super tio, tiel formante figuron de piramido. La triangulo en la ebenaĵo do

finiĝas per la nombro 3; kio aldoniĝas, tio en la ordo de la nombroj produktas la 4, en tiu de la figuroj la piramidon, kaj per tio do solidan korpon.

51 Krome ankaŭ pri tio ĉi oni pensu: 4 la unua kvadrato, produkto de du identaj ciferoj, estas mezuro de justeco kaj egaleco. Krome ĝi estas la sola nombro, kiu estiĝas el adicio kaj multobligo de du identaj ciferoj, adicie el 2 plus 2, multoblige el 2 x 2; per tio belan formon de harmonio ĝi montras, kiu ĉe neniu alia cifero estas trovebla. Tio tuj konstateblas ĉe la 6; tiu estas la adicio de 2 trioj; sed kiam tiujn oni obligas, tio ne faras 6 sed alian ciferon, la 9.

52 La nombro 4 havas ankoraŭ multajn aliajn ecojn; tiuj devas esti traktataj pli detale en specife al ĝi dediĉita traktaĵo. Pormomente sufiĉas aldoni la jenon: ankaŭ ĉe la formiĝo de la tuto de ĉielo kaj tero tiu ĉi nombro estis principo; ĉar la kvar elementoj, el kiuj kreiĝis ĉi ĉio, aperis el la nombro 4 kvazaŭ el fonto. Krome ankaŭ la sezonoj, kiuj estas la kaŭzo de la estiĝo de la vivantaj estaĵoj kaj plantoj, estas 4 laŭ nombro; la jaro ja konsistas el kvar eroj, vintro, printempo, somero kaj aŭtuno.

La lumo, la okulo, la filozofio

53 Ĉar la menciita nombro en la naturo havas tiel gravan pozicion, estis ja necese ke en la kvara tago la Kreinto ornamis la ĉielon per tre bela, Dia ornamo, la steloj lumantaj. Kaj ĉar Li sciis ke la lumo estas la plej bona el ĉio kio ekzistas, Li faris ĝin instrumento de la plej bona sensorgano, la vidkapablo. Ĉar kio estas la spirito en la animo, tio estas la okulo en la korpo. Ambaŭ ja vidas: la spirito vidas la noetan lumon, la okulo la sense percepteblan. Por vidi la nemateriajn objektojn la animo bezonas komprenon; la okulo por percepti la fizikajn aĵojn bezonas lumon; tio por la homoj estas ankaŭ fonto de multaj aliaj bonfaroj, precipe de la plej granda bono, la filozofio. **54** Ĉar per la lumo la okulo estis direktita supren, kaj per la perceptado de la naturo de la steloj kaj ilia harmonia moviĝo kaj de la ordigitaj orbitoj de steloj kaj planedoj – el kiuj la unuaj ĉiam rondiras laŭ unu sama irejo, la laste menciitaj en malsamaj, kontraŭaj orbitoj faras duoblajn ĉirkaŭirojn – kaj perceptante la harmoniajn, laŭ la leĝoj de la perfekta muziko ordigitajn rondodancojn de

ĉi tiuj ĉielkorpoj, la okulo donis al la animo ekstazon kaj ĝuon kiuj estas nepriskribeblaj. La animo ĝuis la spektaklojn kiuj, unu post la alia, al ĝi montriĝis, kaj estis plenigita de nesatigebla malsato. Poste ĝi profundiĝis, kiel volonte ĝi faras, en la demando, kio estas la esenco de ĉi tiuj percepteblaj aĵoj, kaj ĉu ili estas neestiĝintaj aŭ ricevis komencon de estiĝo, kaj kiaspecan moviĝon ili havas kaj kiuj estas la kialoj kiuj regulas ĉies ekziston. El tiuj aferoj naskiĝis la fenomeno filozofio, la plej perfekta bono kiun ricevas la homo.

La astroj

55 Celante la ideon de la noeta lumo, pri kiu koncerne la senmateria mondo estis parolite¹⁹, Dio do kreis la percepteblajn stelojn, Diajn bildojn de nesuperebla belo, kiujn Li estigis kvazaŭ en templo de la plej sankta parto de l' materia realo, la ĉielo, kaj tion kun multaj celoj; unue por doni lumon, due por doni signon, plue por indiki la ĝustan tempon de l' sezonoj, kaj fine por indiki tagojn, monatojn kaj jarojn, kiuj ja estas la mezuroj de la tempo kaj generis la naturon de la nombro. **56** Kiel grandaj estas la utilo kaj la avantaĝo, kiujn liveras ĉio ĉi tio, estas klare el la realo. Sed por ekzakta scio eble ne estas superflue elserĉi la veron de nia pensado. Dividinte la tutan tempon en du partojn, tagon kaj nokton, la Patro konfidis la regadon pri la tago al la suno, kvazaŭ al iu granda reĝo, sed tiun pri la nokto al la luno kaj la granda nombro da steloj kiuj krome ekzistas. **57** La grandeco de potenco kaj regado kiujn havas la suno, trovas tre klaran pruvon en ĉi jam menciita fakto: tiu unu-nura suno por si mem sola ricevis la tagon, kio estas duono de la tempo, dum al ĉiuj ceteraj astroj, kune kun la luno, atribuiĝis la alia duono, kiu nomiĝas nokto. Kaj kiam leviĝis la suno, la brilo de tiom da steloj ne nur paliĝas, sed ili komplete malaperas en la inundo de la lumo; sed kiam ĝi subiras, ili ĉiuj kune komencas montri sian propran naturon.

58 Ili estis kreitaj, kiel Li mem jam diris²⁰, ne nur por sendi lumon al la tero, sed ankaŭ por montri signojn pri aferoj kiuj okazos. Ĉar surbaze de ilia leviĝo aŭ subiro aŭ ilia mallumiĝo aŭ ankaŭ de ilia apero aŭ malapero aŭ de aliaj ŝanĝiĝoj en ilia moviĝoj, la homoj konjektas pri kio devos

¹⁹ Vidu § 30.

²⁰ Vidu § 55.

okazi: fekundeco aŭ malfekundeco de vegetaĵoj, naskiĝo aŭ morto de brutaro, klara vetero aŭ nuboj, senventeco kaj ŝtormo, leviĝo kaj sekiĝo de riveroj, kvietaj maro aŭ altaj ondoj, perturbo de sezonoj, ĉu ke somere iĝas vintro-malvarme, ĉu vintre varme, ĉu en printempo estas aŭtunece, ĉu en aŭtuno printempece. **59** Ankaŭ estas homoj kiuj surbaze de moviĝo en la ĉielo prognozis aŭ antaŭdiris terskuon aŭ tertremon, kaj sennombrajn aliajn nekutimajn aferojn, tiel ke tute laŭvere estas skribite, ke la steloj estis kreitaj *por prezenti signojn*²¹. Krome *por indiki ĝustajn tempojn*²²: per tiuj tempoj Li celas la sezonojn, kaj ja prave. Ĉar kion indikas ›ĝustaj tempoj‹ se ne la tempon de la bona rezulto²³? Nu la sezonoj ĉion kondukas al maturiĝo kaj tiel al bona rezulto: semado kaj plantado de fruktarboj, naskiĝo kaj kreskado de vivantaĵoj. **60** Ili ankaŭ estis kreitaj por esti mezurilo de la tempoj. Ĉar pere de la regula revoluo de suno kaj luno kaj de la ceteraj ĉielkorpoj estiĝas la tagoj, monatoj kaj jaroj. Samtempe kun tio ankaŭ io alia fariĝis videbla kio estas ekstreme grava, la naturo de la nombro, io kion montris la tempo. Ĉar el unu tago venis la nombro 1, el du tagoj la 2; el tri tagoj la 3, kaj el la monato la 30, el la jaro la nombro kiu egalas al la nombro de l' tagoj kiuj formas tiujn 12 monatojn kune; kaj el la senfina tempo la nombro senfina. **61** Jen do la multaj necesaj funkcioj kiujn per siaj moviĝoj plenumas la steloj ĉe la ĉielo. Kaj – se mi volus diri – por kiom da aliaj celoj ili ja ne taŭgas, kiuj al ni ne estas klaraj – ĉar ne ĉio ja por mortemuloj estas sciebla –, sed kiuj ja kontribuas al la konservado de ĉio kaj kiuj efektive ĉie kaj ĉiumaniere realiĝas per la ordigoj kaj leĝoj kiujn Dio en la ĉiomo fiksas kiel neŝanĝeblajn?

›La kvina tago‹ (Genezo 1:20-23): Kreo de fiŝoj kaj birdoj

62 Post kiam la tero kaj la ĉielo kun ĉiuj tie konvenaj ornamaĵoj estis ĝustigitaj, jen en la tria tago, jen, kiel dirite, en la kvara, Li komencis formi la speciojn de l' vivantaĵoj, unue la akvobestojn en la kvina tago, opiniante ke nenio estas same parenca al la vivantaĵoj kiel la nombro 5. Ĉar la diferenco inter la animhava kaj la senanima precipe troviĝas en la

²¹ Genezo 1:14.

²² Genezo 1:14.

²³ La ĝusta tempo = ὁ καιρός.

kapablo percepti; tiu kapablo disfalas en kvin partojn: la vido, la aŭdo, la gusto, la flaro kaj la palpo. Al ĉiu la Kreinto atribuis propran materion kaj propran distingkapablon, por prijuĝi kio prezentiĝas; al la vidkapablo atribuiĝis la koloroj, al la aŭdado la sonoj, al la gusto la sukaj, al la flaro la odoroj, al la palpkapablo moleco kaj dureco, varmo kaj malvarmo, glato kaj malglato. **63** Li ankaŭ ordonis, ke estiĝu ĉiaj specioj da fiŝoj kaj marbestoj, malsamaj laŭ amplekso kaj ecoj, en malsamaj lokoj. Ĉar en la diversaj maroj troviĝas diversaj specioj da fiŝoj, sed foje ankaŭ la samaj. Sed ne ĉie formiĝis ĉiuj specioj, kaj tio estas komprenebla. Ĉar kelkaj fiŝoj amas malprofundan akvon kaj ne la ege profundan maron; aliaj <amas> golfetojn kaj havenojn, ĉar ili ne povas grimpi sur la sekteron kaj ankaŭ ne kapablas naĝi fore de la tero. Ree aliaj vivas meze de profunda maro kaj tiel evitas antaŭenmetitajn kabojn, insulojn aŭ rokojn. Kaj kelkaj sin sentas bone ĉe hela vetero kaj maro kvietaj, aliaj ĉe ŝtorma maro kaj altaj ondoj, ĉar la senĉesaj batoj ilin durigas, kaj kuraĝe rezistante la ŝtormatakon de la akvo, ili fariĝas ĉiam pli fortaj kaj grasaj.

Tuj poste Li ankaŭ kreis la diversajn speciojn de birdoj, kiuj ja parencas al kio vivas en la akvo – ambaŭ ja estas estaĵoj naĝantaj –, kaj Li lasis neniun specion de l' ĉielendantaj estaĵoj nefinita.

›La sesa tago‹ (Genezo 1:24-31): Kreo de la lastaj bestoj kaj de la homo

64 Kiam do la akvo kaj la aero ricevis la tie hejmajn vivantaĵojn kiel sian heredaĵon, Li sekve alvokis la teron produkti la ceteron – ĉar kio estis ankoraŭ post la plantoj estis la surtere vivantaj bestoj –, kaj Li diris: *La Tero aperigu vivajn estaĵojn, brutojn kaj rampaĵojn laŭ ilia speco*²⁴. Kaj tuj ĝi aperigis, kio al ĝi estis ordonita, bestojn malsamajn laŭ formo kaj fortoj, kun kapabloj kiuj povas noci aŭ esti utilaj.

La ordo en la kreado de la vivantaj estaĵoj

65 Kiel lastan el ĉiuj Li kreis la homon. Kiel, tion baldaŭ mi rakontos. Unue mi montros, ke estis tre brila plano laŭ kiu ĉe la kreado de l' vivantaĵoj Li sin lasis gvidi. Ĉar la plej kruda kaj ne-finlaborita specio de

²⁴ Genezo 1:24.

animo atribuiĝis al la fiŝoj, kaj la plej ellaborita kaj ĉiurilate la plej bona al tiu de la homo; kaj inter ili ambaŭ al la specio de l' bestoj sur la tero kaj en la aero. Tiuj nome havas kapablon percepti pli fortan ol tiu de l' fiŝoj, sed malpli klaran ol tiu de l' homoj. **66** Tial kiel unuajn de l' spirithavaj estaĵoj Li kreis la fiŝojn, kiuj estas pli korpo ol spirito; certasence ili estas vivantaĵoj sen vivo, senanimaj sed tamen moviĝantaj; en ili enestas la anima elemento nur sole por vivteni ilian korpon, kiel oni diras ke salon al viando oni aldonas por ke ne tiel facile ĝi putriĝu. Post la fiŝoj venis la birdoj en la aero kaj la bestoj sur la tero. Tiuj ja havas jam pli fortan kapablon percepti, kaj per sia konstruo pli klare montras la rekonilojn de l' esti inspirita. Kiel lastan de ĉiuj, kiel dirite, Li kreis la homon, al kiu specialan spiriton Li donis, kiu estas kvazaŭ spirito interne de l' spirito, komparebla al la pupilo en la okulo.

67 Tiel do ĉio samtempe realiĝis. Sed se ĉio eĉ samtempe realiĝis, tamen devis esti priskribita en certa ordo, ĉar en estonto denove io estiĝos el io alia. Ĉe la estiĝo de ĉiuj unuopaj estaĵoj la ordo estas jena: la naturo komencas ĉe la plej sensignifa kaj finas ĉe la plej mirinda. Kion mi intencas diri, mi devas klarigi. Estas tiel ke la semo estas la komenco de l' vivaj estaĵoj. Ke tio estas io ŝajne sensignifa, similanta ŝaŭmon, estas klare. Sed kiam, eniĝinte en la uteron, tie ĝi fiksiĝis, ĝi tuj komencas moviĝi kaj prenas la formon de io organa. La organa naturo estas pli altranga ol semo, ĉar moviĝo en la estintaj aferoj ankaŭ estas pli alta ol nur ripozo. Kiel artisto, aŭ pli ĝuste dirite, kiel neriproĉebla arto la naturo mem formas la vivantaĵojn, dividante la humidan substancon sur la membroj kaj partoj de la korpo, tiun de la spiro de la vivo²⁵ sur la fortoj de l' animo, nome de nutrado kaj perceptado; tiun de l' pensado pormomente ni lasu ekster konsidero; tio laŭ aŭtoritato de tiuj, kiuj diras, ke ĝi venas de ekstere en la homon, ĉar ĝi estas Dia kaj eterna. **68** La naturo do komencas ĉe sensignifa semo, sed ĝi finiĝas ĉe la plej alte pensebla, la ekipo de la besto kaj la homo. Ekzakte same okazis ja ĉe la estiĝo de l' ĉiomo. Ĉar kiam plaĉis al la Kreinto fari vivantaĵojn, tiuj kiuj malfermis la vicon estis la pli malaltaj, la fiŝoj, la lastaj tiuj de tre alta kvalito, la homoj, dum la ceteraj troviĝas inter tiuj ekstremoj, pli bonaj ol la unuaj, malpli bonaj ol la duaj, la estaĵoj sur la tero kaj en la aero.

²⁵ Pneŭmo.

La homo kiel bildo kaj similaĵo de Dio

69 Post ĉiuj ĉi aliaj vivaĵoj, kiel dirite²⁶, laŭ la diro de Mozeo la homo estis kreita *laŭ bildo kaj simileco de Dio*²⁷. Tio estas tre bele dirita, ĉar nenio surtere pli similas je Dio ol la homo. Tiun similecon ni ne serĉu en korpaj trajtoj. Ĉar Dio ne havas homan staturon kaj la homa korpo ne estas Disimila. La termino bildo temas pri la gvidanta elemento en la animo, la spirito. Ĉar laŭ tiu sola spirito, la spirito de l' ĉiomo, kvazaŭ laŭ pramodelo, tiu <bildo> estis formita en ĉiu unuopa homo; certasence <ĝi> estas iu Dio de tiu, kiu lin kiel bildon en si portas. Ĉar la lokon, kiun la granda Reganto de l' ĉiomo havas en la mondo, tiun ankaŭ, ŝajne, havas la homa spirito en la homo; li ja estas nevidebla, sed mem ĉion vidas, lia esenco ne estas perceptebla, sed tiun de l' ceteraj estaĵoj li perceptas. Per arto kaj scienco li konstruas reton da vojoj, ĉiuj ĉefvojoj, kaj trairas tiel teron kaj maron, kaj traspuras, kio estas en ambaŭ. **70** Tiam li flugas supren kaj, esplorinte la aeron kaj kio tie sin prezentas, li ankoraŭ pli alte leviĝas, al la etero kaj la vojoj de l' ĉielkorpoj; li spertas la ĥorodancon de l' planedoj kaj fiksjaj steloj, kiuj plenumiĝas laŭ la leĝoj de perfekta muziko²⁸; kaj dum li sin lasas gvidi de la Saĝo kiel gvidanto, li leviĝas super ĉiu sense reala kaj serĉas la spiritan. **71** Kaj kiam en ĝi la ekzemplojn kaj ideojn li vidis, kiujn ĉi tie li jam spektis, kun ilia impona beleco, tiam lin kaptas senalkohola ebrio kaj li ekstaziĝas kiel la koribantoj; kaj plena de alia deziro kaj pli alta sopiro, kiu kondukas lin al la plej alta punkto de l' volbo de l' spirita vero, li havas la senton alproksimiĝi al la Granda Reĝo mem. Sed dum arde li deziras vidi, elverŝiĝas sur lin puraj nemiksitaĵoj radioj da koncentrita lumo, tiel ke de ties radiado obskuriĝas la okulo de l' spirito. Kaj ĉar ne ĉiu bildo similas la originan ekzemplon – multaj ja malsimilas –, al la vortoj *laŭ bildo* Moseo aldonis *kaj simileco de Dio*, por emfazi ke temas pri tre preciza depresaĵo, kiu donas klaran bildon.

²⁶ En § 65.

²⁷ Genezo 1:26.

²⁸ La t.n. Muziko de l' Sferoj.

Kial kreis Dio la homojn ne sola?

72 Tamen prave oni povus starigi la demandon, kial nur la kreon de la homo li ne, kiel ĉion ceteran, atribuas al *unu* Kreinto, sed vekas la impreson, ke temas pri pli ol unu. La Patron de l' ĉiomo li ja jene paroligas: *Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni*²⁹. Li, al kiu ĉio submetigis – mi ja dirus – Li ja ne bezonus ies kunlaboron. Aŭ ĉu estus tiel, ke Li, dum ĉielon kaj teron kaj la maron Li kreis, Li ne bezonis helpon, sed ne estis kapabla sen alies helpo propraforte krei estaĵon tiel etan kaj rompiĝeman kia estas la homo? Nu, kompreneble nur Dio sola konas la veran kaŭzon de ĉi tio, sed mi ne rajtas kaŝi kion, surbaze de akceptinda supozo ŝajnas esti akceptebla kaj verŝajna kaŭzo. Tio estas la jeno:

73 El la estaĵoj kelkaj nek rilatas al virto nek al malvirto, kiel plantoj kaj senracie vivantaj estaĵoj; la unuaj ĉar animon ili ne havas kaj denature estas sen imag-kapablo, la laste menciitaj ĉar ili ne havas spiriton kaj racion. Nu, spirito kaj racio estas tiel dire la hejmo kie malvirto kaj virto laŭnature povas loĝi. Aliaj estaĵoj nur konas la virton kaj neniel scias pri ĉiu formo de malvirto, kiel la steloj. Pri tiuj ja estas dirate, ke estas vivantaĵoj kaj ja dotitaj de spirito, aŭ pli ĝuste: ĉiu mem estas spirito, komplete virta kaj ne impresebla de kiu ajn malbono. Ankaŭ ekzistas estaĵoj, kiuj havas miksitan naturon, kiel la homo, kiu la plej kontraŭajn aferojn en si lasas enveni: saĝo kaj malsaĝo, sinregado kaj senbrideco, kuraĝo kaj malkuraĝo, justeco kaj maljusto, kaj mallonge dirite: bono kaj malbono, belo kaj malbelo, virto kaj malvirto. **74** Por Dio, la Patro de l' ĉiomo, estis tre konvene mem esti la sola Kreinto de la virtaj estaĵoj, ĉar ili estas parencaj al Li. Krome krei indiferentajn estaĵojn ne estis fremde al Lia naturo, ĉar ankaŭ tiuj ne rilatis al la malamika Malbono. Sed la kreado de ĉi miksita specio de kreaĵoj estis io, kio parte taŭgis al Li, parte ne. Taŭgis al Li pro la bonaj kvalitoj, kiuj estis en la miksaĵo, sed ne taŭgis pro la kontraŭaj, fiaj kvalitoj. **75** Tial nur ĉe la estiĝo de la homo li³⁰ diras, ke Dio diris: *Ni kreu*³¹, kio implicas, ke aliajn Li uzis kiel

²⁹ Genezo 1:26.

³⁰ Moseo.

³¹ Genezo 1:26.

kunlaborantojn, por ke la neriproĉeblajn planojn kaj farojn de l' virta homo estu atribuitaj al Dio, la Estro de Ĉio, sed la malbonaj al aliaj estaĵoj sub Li. Ĉar la Patro ne estu la fonto de malbono en liaj infanoj; nu, malbono kaj malbonaj agoj estas ja malbono.

Viro kaj Ino

76 Tre bele, menciinte la Homan Genron, li distingas inter la seksoj kaj diras, ke li estis kreita kiel viro kaj ino. Kvankam la unuopaj homoj ankoraŭ ne formiĝis; en la genro ja ĉeestas la plej apudaj specioj; por tiuj, kiuj havas akran rigardon, ili kvazaŭ en spegulo tie videblas.

Kial la homo kreiĝis lasta? Kvar respondoj

77 Sed oni povas demandi sin, kial la homo estas lasta ĉe la kreado de la mondo. Ĉar la Farinto kaj Patro, kiel atestas la Skribo, kreis lin post ĉiuj ceteraj kreaĵoj. Nu, tiuj, kiuj profunde penetris en la sencon de la leĝoj kaj ilian enhavon priskribas kun la pleja precizo, diras jene: kiam Dio donis al la homo la parencecon kun Li en la dono de l' intelekto, kiu estas la plej sublima donaĵo, Li ankaŭ al li ĉion ceteran ne enviis. Por li Li pretigis kiel por la plej parenca kaj la plej amata estaĵo ĉion en la mondo; Li ja deziris, ke al la homo tuj ĉe sia estiĝo manku nenio el ĉio necesa por la vivado kaj la bon-fartado. Pri la unua zorgis la riĉa abundo je ĉiuj aferoj, kiujn ĝuas la homo; pri la dua <zorgis> la kontemplado de l' aĉeraĵoj en la ĉielo; tiu kontemplado plenigas la spiriton per mirado kaj estigas en ĝi la deziron kaj la sopiron al ties konado. El tio estiĝis la filozofio, surbaze de kiu la homo, kvankam mortideva, akiras senmortecon³². **78** Nu, same kiel homoj, kiuj organizas bankedon, la gastojn al la tablo ne invitas antaŭ ol ĉion ili havas preta por la bankedo; kaj tiuj, kiuj organizas konkursojn en sporto aŭ sur scenejo³³, ĉion pretigas antaŭ ol la spektantojn ili invitas al teatro aŭ stadiono: la atletojn kaj ĉion, kio estos spektebla aŭ aŭdebla; ĝuste tiel same la Sinjoro de ĉio, kiel la gastiganto ĉe konkurso aŭ bankedo, kiam la homon Li volis inviti al ĝuado kaj spektado, unue ĉion pretigis, kio necesis por ambaŭ. Li deziris, ke la homo, enirante en la mondon, tuj renkontu festmanĝon kaj

³² Vidu § 53-54.

³³ La teatraĵoj de Eŝilo, Sofoklo kaj Eŭripido.

sanktejon por spekti: bankedon plenan je ĉio, kion por uzi kaj ĝui liveras tero, riveroj, maro kaj aero; lokon, kiu montras spektaklon de ĉiaspecaj scenoj, plej mirindaj realaĵoj, plej trafaj kvalitoj, plej belaj moviĝoj kaj ĥordancoj, en la plej harmoniaj aranĝoj, proporcioj de nombroj kaj periodoj plej zorge elektitaj, ĉio pri kio senerare oni povus diri, ke tie troveblas la harmonio de la sferoj, la arĥetipa muziko, vera kaj ekzemplodona; kaj se iu asertas, ke en ĉiuj tiuj moviĝoj troveblas la origine vera muziko, kiu estas ekzemplodona por ĉiu muziko, li ne diros malveron. De tiu pramuziko la plipostaj homoj notis la bildojn en sia animo, kaj surbaze de tio ili donacis tre necesan kaj ege utilan arton al la homaro.

79 Tio estas la unua kialo, kial la homo ŝajne estis kreita kiel lasta el ĉiuj. Sed estas senchave montri ankaŭ duan. Tuj ĉe la unua estiĝo la homo trovis ĉiujn necesajn por sia ekzisto pretaj; en tio kuŝis leciono por la postaj generacioj; estas kvazaŭ la naturo laŭte alkrias ilin, ke ili, kiam la Patron de l' posteularo ili imitos, sen peno kaj ĉagreno vivos en la plej riĉa abundo da ĉio, kion ili bezonas. Tio okazos, se ne la malraciaj ĝuadoj regas la animon per tio, ke frandemon kaj diboĉon ili starigas en ĝi, kaj ankaŭ ne la deziro pri famo, mono kaj potenco alproprigas la regadon pri la vivo, kaj kiam ne la ĉagrenoj ekĝenos kaj misgvidos la pensadon, kaj ankaŭ ne la timo – tiu fia konsilanto – neniigas la ĝermojn de bona agado, nek sencio, malkuraĝo, maljusto kaj la amaso da aliaj malvirtoj atakas la animon. **80** Ĉar en la nuna situacio, kiam ĉiuj menciitaj malvirtoj superregas, kaj la homoj senbride sin transdonis al la pasioj kaj la senlimaj kaj pekaj deziroj, kiujn oni eĉ ne rajtas nomi, trafas ilin konvena puno kiel repago por iliaj malpiaj agoj. Tiu puno konsistas en tio, ke kostas penadon akiri la aĵojn, kiujn la homoj bezonas. Ĉar penante ili sulkigas la agrojn kaj kondukas la akvon el fontoj kaj riveroj tra kanaloj; ili semas kaj plantas, kaj tra la tuta jaro senĉese tage kaj nokte ili faras la lacigan terlaboron, kaj tiel ili provizas sin je siaj vivnecesaĵoj; kaj kelkfoje tio estas magra kaj nesufiĉa ĉar per multaj kialoj estis kaŭzita damaĝo; ĉar aŭ sinsekvaj ekpluvoj kaŭzos katastrofojn, aŭ pezaj ekhailoj terenbatis la kreskaĵojn, aŭ la neĝo frostigis la plantojn, aŭ la ŝtormoj per sia furiozo ĝin radikale ekstermis. Ĉar akvo kaj aero kaŭzas multmaniere, ke fruktoj ne bone evoluas. **81** Sed se la senbridaj impulsoj de la pasio estus trankviligitaj per pripensemo, kaj la emo al maljusteco

kaj ambicio per justo, kaj, mallonge dirite, la malvirtoj kaj la al tio ligitaj kutimoj per virtoj kaj la ekvivalentaj agoj; kaj se tiel la milito en la animo, kiu envere estas la plej malfacila kaj plej peza el ĉiuj militoj, estus finita, kaj paco venus sur ni, kiu kviete kaj kalme ripozigus niajn internajn fortojn, tiam ni povus esperi ke Dio, kiu ja certe estas amanto de virto kaj belo, kaj ankaŭ homama, aŭtomate kreskigus la bezonataĵon kaj ĝin tute preta donus al la homa raso. Estas ja klare, ke estas pli facile sen prilaborado de la grundo instigi aferojn ekzistantajn liveri riĉan frukton ol neekzistantaĵojn igi ekzisti.

82 Tio validu kiel dua kialo. Tria estas la sekva: Ĉar Dio komencon kaj finon de l' kreado kiel necesajn kaj tre interrilatajn kreaĵojn volis lasi harmonii, Li kreis la ĉielon kiel komencon kaj la homon kiel finon; la unuan kiel la plej mirindan inter la teraj kaj pereemaj estaĵoj; la homo estas, tiel dire, ĉielo en miniaturo, kiu portas en si grandan nombron da stelecaj aĵoj kiel bildojn en si, nome la diversajn artojn kaj sciencojn kaj noblajn principojn, kiuj estas la bazoj de malsamaj virtoj. Ĉar ja la pereema kaj la nepereema laŭnature estas kontraŭaj, al la plej belaj en ambaŭ kategorioj Li atribuis lokon ĉe la komenco kaj ĉe la fino; ĉe la komenco la ĉielo, kaj ĉe la fino la homo.

83 Fine ankaŭ la sekva estas alportata kiel deviga kaŭzo: La homo devis aperi kiel lasta, post la kreo de ĉio cetera, ĉar, aperante subite kiel lasta post ĉiuj vivantaĵoj, ilin ĉiujn li lasos perpleksaj. Ĉar neeviteble, kiam lin ili ekvidos, ili estus plenaj je respekto kaj sin kurbigus antaŭ li kiel antaŭ sia sinjoro kaj mastro. Tiel do okazis, ke lin vidante ĉiuj tuj fariĝis komplete malsovaĝaj; kaj ĉiuj, kiuj denature estis tre sovaĝaj, tuj ĉe la unua ekvido fariĝis manipuleblaj; reciproke inter si ili tamen konservis sian nevenkeblan batalemon, sed nur antaŭ la homo ili kondukis malsovaĝe.

La homo regas super la bestoj

84 Estis do ja tial, ke la Patro, kiam Li kreis la homon kiel la nature gvidantan estaĵon, lin ne nur efektive igis ordoni, sed lin ankaŭ emfaze instalas kiel Reĝon super ĉiuj estaĵoj sub la luno, tiuj sur la tero, tiuj en la akvo kaj tiuj en la aero. Ĉar ĉiujn mortidevajjn vivaĵojn, kiuj troviĝas en tiuj tri elementoj, tero, akvo kaj aero, Li metis sub lia potenco; la ĉielulojn Li

esceptis, ĉar por ili estas sorto Dia. Pri tiu potenco la fenomenoj montras tre klaran pruvon. Sennombraj amasoj da bestoj kelkfoje estas regataj de kiu ajn viro, ĉe kio tiu ne devas uzi armilon aŭ pecon da fero aŭ ian defendilon; li nur portas bestofelon kiel kovrilon kaj bastonon por fari indikojn kaj por ĉe sia vojaĝado apogiĝi sur ĝi kiam li fariĝas laca. **85** Tiel la multnombraj gregoj da ŝafoj, kaprinoj kaj bovinoj estas gvidataj de ŝaf-, kaprin- aŭ bovin-gardistoj, homoj, kiuj ne devas esti speciale grandaj kaj fortaj, tiel ke pro sia staturo ili vekus respekton ĉe kiuj ilin vidas. Kaj ĉiuj tiuj tiel forte ekipitaj bestoj – ĉar laŭnature ili havas ekipaĵon por defendi sin – kvazaŭ sklavoj antaŭ la mastro sin klinas kaj faras kio al ili estas ordonita. Taŭroj sin lasas jungi por plugi la teron; profundajn sulkojn ili tiras dumtage kaj foje eĉ nokte; tiel longan irejon ili iras gvidate de farmisto. Virŝafoj, pezaj de sia dika lana kovraĵo, en la printempo kun sia ŝarĝo laŭ ordono de la gardisto pacience sin pretigas aŭ eĉ kviete ekkuŝas kaj lasas sin tondi; ili kutimas fordoni la lanon al tiu, kiu nature estas ilia reĝo, same kiel la urboj pagas la imposton. **86** Kaj jen la plej fervora besto, la ĉevalo; oni facile surmetas al ĝi bridojn, por zorgi ke ĝi ne saltante forkuru. Tre elegante ĝi kurbigas sian dorson por servi kiel komforta sidejo, akceptas rajdiston, kaj lin portante alte sur sia dorso rapidtrote ĝi kuras kaj klopodas atingi tiujn lokojn, kien la rajdisto haste survojas. Tiu tie sidas tre kviete ne lacigante sin kaj plenumas sian vojaĝon utiligante la korpon kaj la piedojn de alia estaĵo.

87 Se iu volus pli longe paroli pri tio, li povus ankoraŭ doni pli da ekzemploj por montri, ke neniu estaĵo estas propra majstro kaj ne submetita al la homo. Sed la supre dirita sufiĉas por tion montri. Sed oni bone konsciu, ke la fakto, ke la homo estis kreita lasta, ne implicas, ke li ankaŭ laŭrange estu lasta. **88** Pruvas tion ĉarkondukistoj kaj stiristoj. La unue menciitaj venas post la jungduo kaj troviĝas do post ĝi, sed ĝin gvidas, kun brido enmane, tien kien ili nur volas, ĉe kio ili ĝin jen igas rapidkuri, jen ĝin bremsas, se ĝi kuras pli rapide ol necese. La stiristo siavice prenas sian lokon en la malantaŭa parto de l' ŝipo, la pobo, sed tamen – por tiel diri – estas la ĉefa inter ĉiuj sur la ŝipo, ĉar la bonfarto de l' ŝipo kaj de ĉiuj sur ĝi troviĝantoj kuŝas en liaj manoj. La Kreinto do kreis la homon post ĉiuj ceteraj kiel iaspecan ĉarkondukiston kaj stiriston, por konduki kaj gvidi la terajn aferojn kaj prizorgi la vivantaĵojn kaj plantojn; Li estas kvazaŭ vicreĝo de la unua, Granda Reĝo.

›La sepa tago‹ (Genezo 2:1-3): Ripozo

Festa tago

89 Post kiam do perfektigis la tuta mondo laŭ la naturo de la perfekta nombro 6, la Patro provizis la sekvantan sepan tagon per gloro, laŭdante ĝin kaj nomante ĝin sankta³⁴. Ĉar estas festa tago, ne de unu urbo aŭ regiono, sed de l' ĉio; ĝi estas la sola, kiu vere meritas nomiĝi universala kaj naskiĝtago de la mondo.

La nombro sep

90 Mi ne scias, ĉu iu la naturon de l' nombro 7 povus prikanti laŭ tuta valoro; vortoj ne sufiĉas. Sed eĉ, se ĝi estas pli mirinda ol kion pri ĝi oni povus diri, tamen ni ne ĉesu klopodi paroli pri ĝi. Kaj eĉ, se ne eblas diri ĉion, eĉ ne la plej gravan, tamen ni klopodu almenaŭ eldiri, kion per nia pensado ni povas atingi.

Nun sekvas ekstreme longa ekskurso pri la gigantaj kvalitoj de la nombro 7, kiu kovras § 91-127. Multe pli detale ol en § 48-52 pri la nombro 4 Filono liveras ekstreme multe da aritmologia informado pri la nombro 7. (Noto de D-ro J.C.M. van Winden.)

La graveco de la sabato

128 Tio ĉi kaj multe pli estis dirita kaj filozofiita pri la nombro 7. Tial ĝi ricevis la plej altan honoron de la naturo, kaj ankaŭ estis honorata ĉe la scienculoj de Greklando kaj ĉe la Barbaroj, kiuj okupiĝas pri matematiko. Ĝi ankaŭ estas alte honorata ĉe la amiko de la virto, Moseo, kiu priskribis ĝian belecon sur la plej sanktaj tabuloj de la Leĝo kaj ankaŭ gravuris en la spiritojn de tiuj, kiuj submetiĝis al li, ordonante al ili, ke ĉiam post ses tagoj la sepan ili festu kiel sanktan tagon, dum kiu ili sin detenu de ĉiu laborado, kiu direktiĝas al la serĉado aŭ akirado de porvivaĵoj, kaj sin nur dediĉu al unu afero, la filozofiado, por plibonigi sian vivon kaj traserĉadi la konsciencon; tiu konscienco estas enkonstruita en la animo kaj ne time retiriĝas, ekagi kiel punanta juĝisto, jen kun seriozaj minacoj, jen

³⁴ Vidu Genezo 2:3.

kun iom pli mildaj ordonoj; minacoj kontraŭ tiuj, kiuj plenintence ŝajnas fari maljuston, sed konsiloj al tiuj, kiuj pekas per pretervido aŭ senpripenso, por ke ne denove ili faru la saman eraron.

Genezo 2:4-5: La senmateria mondo

129 Por fini la kreo-historion Moseo diras en resuma redaktado: *Tio estas la libro pri la Estiĝo de Ĉielo kaj Tero, kiam ĝi estiĝis³⁵, en la tago kiam Dio faris Ĉielon kaj Teron kaj ĉion verdan sur la kampo, antaŭ ol ĝi estiĝis surtere, kaj ĉiu herbo de la kampo, antaŭ ol ĝi ekkreskis³⁶.* Ĉu ĉi tie li ne klare metas antaŭ niaj okuloj la mondon senmaterian, la noetajn formojn, kiuj estas la sigeloj de la depresaĵoj en la sensaj aferoj? Ĉar antaŭ ol la tero fariĝis verda, jam ĉeestis la verdo en la naturo de l' aĵoj – tiel li diras – kaj antaŭ ol la herbo ekkreskis sur la kampo, tie jam estis la nevidebla herbo. **130** Oni devas supozi, ke ankaŭ pri ĉiuj aliaj objektoj de la sensoj ekzistis antaŭe la pli praaj formoj kaj mezuroj, per kiuj ĉio, kio ekzistas, ricevas formon kaj mezuron. Ĉar se ne ĉiujn aĵojn unuope li mencias, sed resumas tiujn, estante senkompare zorgema por esti konciza, tio tamen ne malhelpas, ke la malmulto, kiun li diras, rivelas, kia estas la naturo de ĉio, nome, ke sen senmateria ekzemplo nenio en la sensa mondo realiĝas.

Genezo 2:6: Diferenco inter sala kaj dolĉa akvo

131 Logike pluirante kaj bone atentante la sinsekvon de l' pliposta rilate al la antaŭe okazinta li jene daŭrigas: *Estiĝis fonto el la tero kaj tiu trinkigis la tutan surfacon de la tero³⁷.* La aliaj filozofoj asertas, ke ĉiuj akvoj kune estas unu elemento el la kvar, el kiuj formiĝis la mondo. Sed Moseo rigardis pli atente kaj ankaŭ kutime bone observis kaj perceptis. Li ja opinias, ke la granda maro estas elemento, kaj la kvarono de la tuto, kiun la postaj homoj nomas oceano; kaj ili opinias, ke la maroj, kiujn ni navigas, havas la amplekson de havenoj. Sed la dolĉan kaj trinkeblan akvon ili distingas de la marakvo. La unuan li atribuis al la tero kaj tial

³⁵ Hodiaŭ oni vidas alineon en ĉi versiklo: Per ›kiam ĝi estiĝis‹ finiĝas la pastroskriba kreo-poemo, per ›en la tago‹ komenciĝas la javeista pekad-rakonto (akr).

³⁶ Genezo 2:4-5.

³⁷ Genezo 2:6.

konsideris ĝin parto de la tero, kaj ne de la maro. La kialo supre menciigis, nome, ke la tero devis esti kuntenata per ligilo de dolĉa kvalito, kiu funkcias kiel unuiga gluo, kvazaŭ per rimeno. Ĉar se oni lasus ĝin seka kaj neniu akvo en ĝin penetriĝus kaj tra ĉiuj poroj sin disdividiĝus, tiam ĝi estus disfalinta. Sed ĝi estas kuntenata kaj plu ekzistas, parte per la forto de la unuiga viv-spirado, parte per la humido, kiu ne permesas, ke ĝi skuiĝu kaj difalu en etajn kaj grandajn partojn.

132 Tio estas unu kialo. Tamen mi ankoraŭ menciu ankaŭ alian, kiu havas pretendon de vereco. Nenio surtere povas estiĝi sen humido. Tion oni vidas ĉe la semo de la reproduktado; tiu estas humida, same kiel tiu de ĉiuj vivantaj estaĵoj, aŭ ĝi ne povas ĝermi sen humido, same kiel tio estas ĉe la plantoj. El tio pruviĝas, ke la menciita humideco necesece estas parto de la tero, kiu ĉion estigas, same kiel ĉe la virinoj estas la monataĵo; ĉar natursciencistoj diras, ke tio formas la korpan substancon de la feto.

133 Ankaŭ kio nun estas dirota kongruas kun la supre menciita. Al ĉiu patrino la naturo donis kiel plej necesajn korpo-partojn brustojn: estas kvazaŭ fontoj; en ili ŝi produktas nutraĵon por la naskota infano. Ankaŭ la Tero estas, kiel eblas vidi, ia patrino. Tial la unuaj homoj opiniis bone nomi ŝin Demetra, ĉe kio ili kombinis la nomojn ›panjo‹ kaj ›terox‹³⁸. Ĉar, kiel diras Platono, la tero ne imitas la patrinon, sed la patrino la teron; tiun lastan la poetoj nomis laŭvere ›ĉio-panjo‹, ›fruktportantino‹ kaj ›ĉiodonema‹³⁹, ĉar ŝi estas la fonto de estiĝo kaj konservado same de vivantaĵoj kiel de plantoj. Do estas tre okulfrappe klare, ke la naturo al la tero kiel al la plej malnova kaj plej fekunda patrino donis kvazaŭ brustojn la fluojn de riveroj kaj fontojn, por ke la plantoj estu provizitaj de akvo kaj ĉiuj vivantaĵoj abunde povu trinki.

Genezo 2:7: La kreiĝo de la homo el la tero

134 Poste li diras: *Dio prenis pecon da tero kaj modlis el ĝi la homon, kaj Li enblovis en lian nazon spiron de vivo kaj la homo fariĝis viva animo*⁴⁰. Tre klare ĉi tie li montras, ke estas tre granda diferenco inter la nun

³⁸ De – Diino; Meter – Patrino.

³⁹ Pandora.

⁴⁰ Genezo 2:7.

modlita homo kaj tiu, kiu antaŭe estis modlita laŭ la bildo de Dio. Ĉar la nun modlita homo estas sense perceptebla kaj jam havas certajn ecojn, konsistas el korpo kaj animo, estas viro kaj virino, kaj estas nature mortideva. La homo laŭ la bildo estas ideo aŭ iaspeca sigelo, noeta, senmateria, nek viro nek ino, laŭnature senmorteca. **135** Li diras, ke la sense perceptebla individua homo havas strukturon, kiu konsistas el tera substranco kaj Dia spiro. Ĉar la korpo estiĝis per tio, ke la Artisto prenis pecon da tero kaj el ĝi modlis homan figuron; sed la animo tute ne venas de io kreita, sed de la Patro kaj Mastro de ĉio. Ĉar kion Li enblovis estis nenio alia ol Dia spiro, kiu el tiu plej feliĉa naturo ĉi tien migris por subteni nian genron, por ke, se eĉ mortideva laŭ sia videbla parto, almenaŭ laŭ sia nevidebla parto ĝi estu senmorta. Tial oni do povas diri, ke la homo staras ĉe la limo inter mortideva kaj senmorta naturo kaj partoprenas en ambaŭ kiom eblas, kaj ke samtempe mortideva kaj senmorta li kreiĝis, mortideva laŭ la korpo, senmorta laŭ la spirito.

136 Tiu unua homo, naskita el tero, prapatro de nia homa gento, estis, kiel ŝajnas al mi, en ambaŭ rilatoj mirinda, anime kaj korpe, kaj superis ĉiujn plipostajn homojn grande en perfekteco, kiun li posedis en ambaŭ rilatoj. Ĉar li vere estis bela kaj nobla⁴¹.

Mirindeco laŭ la korpo

Pri la beleco de korpa figuro oni povas doni tri argumentojn. La unua el ili estas: ĉar la tero ĉe la disiĝo de la granda akvamaso, kiu nomiĝis maro, kvazaŭ nova kreaĵo estiĝis, la materio, el kiu formiĝis la aferoj, ankoraŭ estis nemiksita, pura kaj senmanka, kaj supla kaj manipulebla, kaj kio el ĝi estis modlita kompreneble estis senriproĉa. **137** Due estas evidente, ke Dio ne el la unua renkontita terpeco prenis manplendon kaj el tio en pleja rapido volis formi la homo-bildon. Ne, el la tuto Li elektis la plej bonan pecon, kaj el pura materio Li elserĉis la plej puran pecon, kiu pleje taŭgis por kion Li volis fari. Ĉar kio estis farita, estis sankta loĝejo kaj sankta templo de l' racia animo; la homa korpo devis tion porti en si kiel plej Di-similan. **138** Tria argumento, kiu estas nekomparebla al la antaŭaj, estas la sekva: la Kreinto estis, same kiel en ĉio cetera, ankaŭ lerta en la arto de la kreado: la sekvo de tio estis, ke ĉiu korpoparto en si

⁴¹ Laŭ la klasika Greka idealo.

mem havis konvenan cifero-rilaton, kaj ankaŭ koncerne la funkciadon de la tuto estis atente ekipita. Kaj krom ĉi simetrio al la korpo Li ankaŭ donis konvenan mezuron kaj sanan koloron; Li ja deziris, ke la unua homo aspektu kiel eble plej bele.

Mirindeco laŭ la animo

139 Ke li ankaŭ anime estis mirinda, estas evidente. Ĉar Dio ĉe ĝia farado klare uzis neniun ekzemplon el la mondo de l' estiĝo, sed, kiel mi jam diris, nur sian propran Logoson⁴². Tial li diras, ke la homo estis kreita kiel bildo kaj similaĵo de tiu Logoso. Li blovis al li en la vizaĝon, kie estas la loko de la sensoj, per kio la Kreinto vivigis la korpon; kaj post kiam la pensadon kiel reĝon Li lokis en la gvidan parton, al tiuj sensoj Li ordonis servi la pensadon per perceptado de koloroj, sonoj, krome de gustoj, odoroj kaj simile, kiujn la pensado en si mem sen perceptado ne kapablas kapti. Neeviteble la imitado de bela ekzemplo devas esti mirinda. Nu, la Logoso de Dio estas pli nobla ol la beleco mem, tio estas beleco, kiu estas en la naturo. Ĝi ne estas ornamita per beleco sed, por diri la veron, al la beleco ĝi donas ĝian plej belan ornamon.

Diferenco inter la unua homo kaj la nuna homo

140 Tiel, kiel ŝajnas al mi, la unua homo estis kreita korpe kaj anime, kaj li superas ĉiujn, kiuj nun vivas kaj antaŭ ni estas vivintaj. Ĉar ni naskiĝas el homoj, sed de li Dio estis la farinto. Nu, ju pli altranga estas la farinto, des pli mirinda estas, kio estiĝas; ĉar same kiel kio estas en florado estas pli bona ol kio jam estas forflorinta, ĉu temas pri vivantaĵo aŭ planto aŭ frukto aŭ kio ajn en la naturo, same tiel ŝajnas, ke la unue formita homo estis apogeo de sia gento, kaj ke pli postaj homoj ne plu atingis tiun apogeon, ĉar ĉiuj gentoj post tio en aspekto kaj forto degeneris. **141** Tiun fenomenon mi konstatis ankaŭ en skulptarto kaj pentrarto. Imitaĵoj ĉiam postrestas ĉe la originalo, kaj se la imitaĵojn oni ree imitas pentrante aŭ skulptante, tio validas ankoraŭ pli, ĉar ili distancas multe de la originalo. Io simila konstateblas ĉe la magneto. El la feraj ringoj tiu, kiun tuŝas la magneto, estas tre forte tenata, tiu kiu tiun unuan tuŝas, malpli; iu tria tamen dependas de la dua kaj iu kvara de la

⁴² Vidu § 24.

tria kaj iu kvina de la kvara, kaj tiel plu, en longa vico; ili kunteniĝas de unu altirforto, sed ne samforte; ĉar la ringoj kiuj pendas pli diste de la komencpunkto estas malpli ligitaj, ĉar la altirforto malkreskas kaj ne plu kapablas samforte kunteni ilin. Io simila ŝajne okazis al la homa gento; ĉe ĉiu sekva generacio la fortoj kaj kvalitoj de korpo kaj animo malpliĝis.

La homo kiel mondcivitano

142 Kiam tiun prapatron ni ne nur nomus la unuan homon sed ankaŭ la solan mondcivitanon, ni unue diros ion, kio estas absolute vera. Ĉar lia domo kaj lia urbo estis la mondo, ĉar ankoraŭ neniu konstruaĵo estis farita per homa mano el ŝtono aŭ ligno. En tiu mondo li vivis kvazaŭ en patrujo kaj sentis sin sekure; li ne konis timon, ĉar li estis juĝita inda regi pri la tero. Kaj ĉar ĉiuj vivantaĵoj antaŭ li kurbiĝis kaj lernis obei al li kiel al sia mastro kaj foje eĉ estis devigitaj al tio, li vivis sekure en la ĝuado de paco sen batalado.

143 Sed ĉar ĉiu ordigita urbo havas leĝan sistemon, estis necese ke la mondcivitano vivu laŭ la sistemo, kiu ankaŭ regulas la tutan mondon; tio estas la ›rekta racio‹ de la naturo, kiu pli ĝuste nomiĝas ›ordono‹, ĉar estas Dia leĝo, laŭ kiu ĉiu estaĵo ricevis la ĝustan kaj konvenan. Tiu urbo, tiu sistemo, devis jam havi civitanojn antaŭ la homo, kiujn prave oni nomu civitanojn de la granda urbo; ili ricevis la plej grandan spacon kaj enskribiĝis en tiu grandioza kaj plej perfekta urbo. **144** Kio tiuj estus, se ne saĝaj, Diaj estaĵoj, kelkaj nefizikaj kaj noetaj, aliaj ne sen korpo, kiel estas koncerne la stelojn? Ĉar la homo kun ili rilatis kaj kunvivis, kompreneble lia vivo disvolviĝis en pura feliĉego. Li estis intime parenca al la Estro, ĉar al li la Dia spiro estis larĝe konfidita; tial li rapidis diri kaj fari ĉion tiamaniere, ke plaĉu al la Patro kaj Reĝo, dum ties spurojn li sekvis laŭ la padoj, kiujn faras la virtoj; ĉar nur al spiritoj, kiuj faras sian celon, ke ili simulu al sia Kreinto Dio, estas permesite alproksimiĝi al Li.

Parenceco kun la unua homo

145 Per tio la belecon de la unua homo, laŭ animo kaj laŭ korpo, ni traktis. Povas esti, ke ni restis longe for de la realo, sed ni faris, kion ni kapablis. Ne estis aliel ol ke liaj posteuloj, kiuj partoprenis en la perfekta

bildo, kiu estis en li, devis konservi la rekonilojn de l' parenceco kun la prapatro, eĉ se nur svage. En kio konsistis tiu parenceco? **146** Ĉiu homo per sia menso estas parenca al la Logoso de Dio kaj tiamaniere estas printaĵo aŭ fragmento aŭ rebrilo de l' feliĉega Dia naturo. Laŭ la strukturo de sia korpo li parencas al la tuta mondo; ĉar ĉi korpo estas miksaĵo konsistanta el la samaj elementoj, tero, akvo, lumo kaj fajro, kaj ja tiamaniere, ke ĉiu elemento kontribuas al perfektigo de materio, kiu plenumis ĉiujn kondiĉojn, kiujn la Kreinto devis apliki por realigi sian videblan bildon. **147** Krome la homo troviĝas en ĉiuj menciitaj elementoj kiel lokoj, kiuj al li estas tre familiaraj kaj parencaj; kaj li ŝanĝas lokojn kaj eniras jen en ĉi tiun elementon, jen en alian; tiel tute laŭvere oni povas la homon nomi estaĵo de la tero, de la akvo, de la aero kaj de la ĉielo. Kiom li loĝas kaj iras sur la tero, li estas estaĵo de la tero; kiom li ofte plonĝas, naĝas aŭ ŝipveturas, li estas estaĵo de la akvo – komercŝipistoj, ŝipekipistoj kaj purpurfiŝistoj kaj ĉiuj, kiuj ĉasas ostrojn aŭ fiŝojn, estas klara pruvo pri la ĉi-tie-dirita –; kiom lia korpo estas levita de la tero supren kaj ŝvebas en la aero, oni prave povas diri, ke li estas aervojaĝisto; krome li ankaŭ estas ĉiela estaĵo, ĉar per la ĉion penetranta senso, la vido, sunon kaj lunon kaj ĉiun el la ceteraj ĉielkorpoj, planedojn kaj fiksaĵojn, li alproksimiĝas.

Genezo 2:19: Doni nomojn

148 Tre mirinde Li ankaŭ atribuas la donadon de nomoj al la unua homo⁴³. Ĉar tio ĉi estas afero de saĝo kaj reĝa aŭtoritato. Kaj tiu homo estis saĝa kaj posedis tiun saĝecon el si mem, ĉar li estis kreita de la mano de Dio, kaj li ankaŭ estis reĝo. Nu, al reĝo decas doni al ĉiuj el siaj subuloj nomon. Estis kompreneble ekstreme forta potenco, kiun havis la unua homo; forminte lin zorgeme, Dio konfidis al li la duan lokon; Li ja faris lin sia vicreĝo, sed starigis lin kiel reĝanto super ĉio cetera; ĉar eĉ tiuj, kiuj naskiĝas tiom da generacioj poste, nun kiam la homa raso per la longa irado tra la tempo perdis sian forton, tamen ankoraŭ regas super la senraciaj estaĵoj kaj tiel ili – por tiel diri – ankoraŭ tenas la lampon de regado kaj de reĝpotenco flamanta, kiun de la unua homo ili ricevis. **149** Li do diras, ke ĉiujn bestojn Dio kondukis antaŭ Adam, ĉar Li volis vidi,

⁴³ Genezo 2:19.

kiun nomon al ĉiuj li donos; tion Dio faris, ne ĉar Li dubis pri tio – ĉar por Dio nenio estas nesciata –, sed ĉar Li sciis, kiel la racian naturon de l' mortidevuloj Li provizis per propra libereco de moviĝo, por ke Li mem ne havu parton en la malbono. Li elprovis lin, kiel instruisto faras ĉe lernanto, aktivigante lian jam ekzistantan emon kaj instigante lin montri la agojn, kiuj apartenas al lia tasko, por ke laŭ propra iniciato nomojn li donu, kiuj ne estu maltrafaj aŭ maldecaj, sed kiuj bone montru la kvalitojn de la koncernaj estaĵoj. **150** Ĉar la penskapablo de lia animo ja ankoraŭ ne estis damaĝita kaj enŝteliĝis en ĝin ankoraŭ neniu malforto, malsano aŭ pasio, la impresojn de korpoj kaj objektoj li ankoraŭ tute klare perceptis kaj donis al ili la trafajn nomojn, ĉar li vidis ekzakte, kion koncernas ĉiu objekto, tiel ke kuntrafis komprenado kaj nomado de la naturo de l' aĵoj.

La misfaro de la unua homo

151 Sed ĉar nenio estas daŭripova el ĉio, kio estas submetita al estiĝo kaj pereado, kaj ĉio mortideva neeviteble estas submetita al estiĝo kaj ŝanĝiĝo, ankaŭ la unua homo do devis kontaktiĝi al iu malbono. Kialo por mallaŭdinda vivado fariĝas por li la virino. Ĉar dum li estis sola, en sia unu-eco li similis al la mondo kaj al Dio kaj en sia animo li portis la karakterojn de ambaŭ, ne ĉiujn, sed tiom, kiom mortideva kreitaĵo ĝin povas enhavi. Sed ankaŭ kiam formiĝis la virino, li vidis similan eksteriĝon kaj parencon figuron; ĝoja li iris ĝin vidi, alpaŝis ŝin kaj salutis ŝin. **152** Kaj ĉar ŝi perceptis neniun vivan estaĵon, kiu pli al ŝi similis ol li, ŝi ĝojis kaj hezite respondis lian saluton. Tiam aldoniĝis la amo, kiu unuigis kaj kombinis ilin kiel du apartajn duonojn de unu vivantaĵo, post kiam ĝi en ambaŭ enmetis la sopiron al kuniĝo kun la alia cele al naskado de estaĵo simila al ili. Tiu deziro ankaŭ estigis la korpan ĝuon, kiu estas la origino de maljustaĵoj kaj de malobeo al la leĝo; kaj per tio ili interŝanĝis la mortidevan kaj malfeliĉan vivadon por la senmorta kaj feliĉa.

Alegoria interpreto de la ĝardeno

153 Kiam la viro, antaŭ ol formiĝis la virino, ankoraŭ havis vivon solecan, antaŭ ol formiĝis la virino, de Dio – tiel diras la teksto – estis konstruita

ĝardeno, kiu en nenio similis la nunajn ĝardenojn⁴⁴. Ĉar en ĉi lastaj la arbaroj estas senspiritaj, plenaj je ĉiuspecaj arboj; kelkaj estas ĉiamverdaj kaj daŭra ĝojo por la okulo, aliaj sin printempe ĉiam denove ornamas per juna verdaĵo; kaj parte ili portas malsovaĝajn fruktojn por la homoj, ne nur por la necesa vivteno, sed ankaŭ por la ekscesa ĝuo de luksa vivado, parte estas alispecaj, kiuj estas aljuĝataj al bestoj por ilia necesa vivteno. Sed en la Dia ĝardeno estis tiel, ke ĉiuj plantoj estis dotitaj de spirito kaj prudento; ili portis la virtojn kiel fruktojn kaj krome puran komprenon kaj sagacon, dank' al kio distingiĝas bono kaj malbono, kaj krome vivado sen malsano kaj en senmortecon kaj tiel plu.

154 Ŝajnas al mi, ke tiu ĉi prezento estas prefere metafora ol laŭlitera. Ĉar arboj de vivo kaj de kompreno en la pasinteco neniam staris surtere kaj plej probable ankaŭ neniam estos. Sed Moseo, ŝajne, en la bildo de la ĝardeno montras la gvidan organon de la animo, kiu plenas de sennombraj opinioj same kiel de same multaj plantoj; kaj per la arbo de la vivo li indikas la plej grandan virton, la Di-adoron, per kiu la animo ekhavas senmortecon; per tiu de la scio pri bono kaj malbono la virton, kiu staras meze, per kiu prijuĝiĝas la nature kontraŭaj aferoj.

155 Post kiam Dio plantis tiujn kriteriojn en la animo, kvazaŭ juĝisto Li atentis, kiudirekten ĝi kliniĝos. Kaj kiam Li vidis, ke ĝi inklinas en la direkton de l' malbono kaj malestimas la Di-adoron kaj la sanktecon, el kiuj estiĝas la senmorta vivo, Li ĝin malakceptis, kiel kompreneble estas, kaj forpelis ĝin el la ĝardeno kaj al la animo, kiu kaŭzis neripareblan kaj nesaniĝeblan malbonon, Li lasis neniun esperon pri posta reveno. Ankaŭ la kaŭzo de la trompo estis grave malaprobinda; kaj tiun ni ne silente povas preteriri. **156** Estas dirate, ke en malnovaj tempoj la venena, el la tero naskita rampanta besto havis homsimilan voĉon kaj ke foje ĝi riproĉis al la virino pri troa malrapido kaj troa zorgemo, ĉar ŝi hezitis kaj ne decidiĝis pluki iun frukton, kiu aspektis bela por la rigardo kaj bongusta por gustumi kaj krome tre utila, ĉar per ĝi scion oni povus akiri pri bono kaj malbono; kaj ke sen plua pripensado sekve de iu malforto kaj nestabileco en la konvinko ŝi konsentis kaj manĝis de la frukto kaj el ĝi donis al sia edzo. Tio subite ĵetis ilin el situacio de senpekeco kaj simpleco en la malbonon. Pri tio la Patro koleris – estis ja ankaŭ ago por

⁴⁴ Genezo 2:8 kaj sekve.

koleri pri ĝi, ĉar preterirante la arbon de l' vivo senmorta, t.e. la perfekta virto, ĉe kiu ili povus pluki longan kaj feliĉan vivon, ili elektis la mallongdaŭran kaj mortidevan vivon, kiu efektive ne estas vivo, sed tempo plena de mizero –, kaj Li decidis por ili pri la punoj, kiujn ili meritis.

La serpento simbolo de ĝuado

157 Tiuj ĉi ne estas elpensitaj historioj, kiel poetoj kaj sofistoj volonte rakontas, sed ĉi tie bildoj estas alvokitaj, kiuj petas alegorian klarigon pri tio, kio kaŝe estas montrata. Oni povas racie akcepti, ke la ĉi tie menciita serpento estas simbolo de la ĝuo; unue ĝi estas besto, kiu ne havas piedojn kaj platigite antaŭen surventre kuŝas; due ĝi sin nutras per gleboj da tero; trie en siaj dentoj ĝi portas la venenon, per kiu ĝi mortigas tiujn, kiujn ĝi mordas. **158** Nu, ĉe la homo ĝuema troveblas ĉiuj ĉi aferoj; ĉar sian kapon li apenaŭ povas levi supren, ĉar ĝi estas peza kaj subentirata de la malmodereco, kiu lin lasas ŝanceliĝi kaj fali. Krome li sin nutras ne per ĉiela nutraĵo, kiun prezentas la Saĝeco en siaj diroj kaj ordonoj al ĉiuj, kiuj deziras vidi viziojn, sed per la nutraĵo, kiun prezentas la tero en la diversaj sezonoj; el tio devenas ebrio kaj frandadoj kaj avidegeco; tiuj eĉ plifortigas la dezirojn de la stomako kaj lasas ilin eksplodi, kaj tiel ankaŭ vekas la pli malsuprajn stimulojn kaj tiujn eĉ plifortigas. Li rigardas plena je deziro la laboron de kuiristoj kaj restoraciestroj, li turnas sian kapon kaj klopodas kapti la odoron de bongustaj nutraĵoj, kaj kiam riĉe pretigitan tablon li vidas, senretene li sin ĵetas al la pretigitaj frandaĵoj; li celas elmanĝi ĉion samtempe, ĉe kio lia celo estas ne, satigi sin, sed nenion postlasi el ĉio prezentita. **159** Tial same kiel la serpento li kunportas kun si la venenon en la dentoj; tiuj ja estas la servistoj kaj helpantoj de l' nesatigebla deziro; kaj ili tranĉas ĉiujn manĝaĵojn en pecojn kaj muelas ĝin tre fajne, kaj poste ili unue prezentas ĝin al la lango, kiu juĝas pri la sukaj kaj decidat, poste al la gorĝo. Malmodero en manĝado estas laŭnature venena kaj mortiga, ĉar ne povas okazi digesto ĉe aldonado de nova nutraĵo antaŭ ol la antaŭa estas digestita.

La voĉo de la serpento

160 Pri la serpento oni rakontas, ke homan voĉon li havas, ĉar la ĝuo havas amason da probatalantoj kaj advokatoj, kiuj prenis sur sin defendi

kaj per zorgo ĉirkaŭi ĝin. Ili kuraĝas distribui la opinion, ke la ĝuo havas potencon pri ĉio, eta kaj granda, senescepte pri ĉio ajn.

161 Tiel la unua kuniĝo inter viro kaj virino havas la ĝuon kiel akompananton, kaj per ĝi realiĝas la generado de la infano. Kaj la infano nenie sin sentas same bone hejme; ĝi ĝojas pro la ĝuo kaj forpuŝas ĝian malon, la ĉagrenon. Tial la infano ankaŭ ploras, kiam ĝi naskiĝas; kiel kompreneblas, ĝi ĉagrenas pro la malvarmo. Ĉar el la tre varma, ja varmega spaco de la utero, kie longtempe ĝi troviĝis, subite ĝi transiras en la eksteran aeron, malvarman lokon al kiu ĝi ne kutimis; pro tio ĝi ektimas kaj per sia plorado klare ĝi pruvas, ke ĉagrenon ĝi spertas kaj kontraŭas doloron. **162** Krome oni diras: ĉiu vivantaĵo celas ĝuon kiel plej gravan kaj plej necesan celon en la vivo, kaj precipe la homo. La ceteraj tion alstrebas nur per gustosentumo kaj seksorganoj; sed la homo tion faras ankaŭ per la ceteraj sensumoj. Li ĉasas al ĉiuj bildoj kaj sonoj, kiuj povas doni ĝuon al orelo kaj okulo. **163** En ankoraŭ multaj aliaj vortoj estas laŭdata la spertado de ĝuo kaj oni diras, ke ĝi estas la plej propra al la vivantaĵoj. Sed la supre dirita sufiĉas por montri, kial la serpento ŝajnis havi homan voĉon. Estas, kiel ŝajnas al mi, speciale pro tio, ke Moseo en la specialaj leĝoj, en kiuj li skribas pri la bestoj, kiujn oni jes aŭ ne rajtas manĝi, specife tiun ›serpent-manĝanton‹ laŭdas⁴⁵, kiu estas reptilio kun kruoj super la piedoj, per kiuj de la tero ĝi povas supren salti kaj leviĝi en la aeron, same kiel la genro de la akridoj. **164** Tiu serpent-manĝanto ŝajnas al mi esti nenio alia ol la simbolo de sinregado, kiu senfinan batalon kaj nepacigeblan militon havas kontraŭ malmodero kaj troa ĝuado. Ĉar la sinregado tre ŝatas simplecon, abnegacion kaj ĉion, kio necesas por severa kaj sankta vivado. Male la ĝuado preferas troigon kaj malŝparon, kiuj kaŭzas molecon kaj inecon anime kaj korpe, kio rezultigas pekeman vivstilon, kiu por la sane pensantaj homoj estas pli aĉa ol la morto.

La serpento sin turnas al la virino

165 La ĝuo kun sia trompa fascino ne kuraĝas turni sin al la viro, sed turnas sin al la virino kaj pere de ŝi al li, tre lerte kaj celtrafe. Ĉar en ni la cerbo rolas kiel viro, la percepto kiel virino. La ĝuo unue faras kontakton

⁴⁵ Levidoj 11:22.

kaj ekparolas kun la sensoj, kaj pere de tiuj ĝi misgvidas ankaŭ la gvidantan cerbon. Ĉar kiam la sensoj ĉiuj cedis antaŭ liaj tentoj, estante ĝojaj pri kio al ili estas trompe promesata – la okulo ĉe la riĉa variado da koloroj kaj formoj, la orelo ĉe la harmonio de sonoj, la gustumo ĉe la dolĉeco de sukoj, la flaro ĉe la bonodoraj aromoj, kiuj leviĝas –, tiam tiujn donojn, akceptinte ilin, ili alportas al la cerbo de sia estro; kaj kiel advokatojn ili kunprenas la persvadopovon, por zorgi, ke tiu cerbo absolute nenion rifuzu. La cerbo tuj sin lasas konvinki kaj ŝanĝiĝas de estro en subulon, de mastro en sklavon, de civitano en ekziliton, de senmorta en mortidevan. **166** Se diri mallonge, oni devas scii, ke la ĝuo kvazaŭ malĉasta prostituitino esperas trovi amanton kaj serĉas svatistojn por pere de tiuj trovi tiun. Nu, estas la sensoj, kiuj rolas kiel svatistoj kaj alportas la amanton. Kiam la ĝuo sukcesis logi la sensojn, ĝi facile submetas al si la spiriton. La sensoj ja facile enkondukas ĉe ĝi la eksterajn fenomenojn kaj anoncas ilin kaj metas ilin antaŭokule; ili encerbigas al ĝi ĉiujn formojn de l' aĵoj kaj kaŭzas la koncernajn emociojn. Ĉar ĝi estas kvazaŭ vakso; ĝi akceptas la enprintaĵojn en si, kiuj pere de la sensoj ĝin atingas kaj per tio perceptas la materiajn aferojn, kion, kiel mi jam diris, el si mem ĝi ne povas.

La puno

167 La rekompenco de la ĝuo tuj spertis tiuj, kiuj fariĝis la unuaj sklavoj de tiu peza kaj malfacile kuracebla malsano. La virino ricevis por suferi la pezajn dolorojn de l' naskado kaj la ĉagrenojn, kiuj en la plua vivo sinsekvas, precipe tiujn, kiuj koncernas infanojn, kiam ili naskiĝas kaj devas esti edukataj, kiam ili malsanas kaj kiam ili estas sanaj, kiam ili prosperas kaj kiam ili estas malfeliĉaj; krome estas la perdo de libero kaj la superregado de la viro ĉe ŝia flanko, al kies deziroj ŝi devas obei. La viro siavice ricevas pezajn klopodojn por plenumi kaj daŭre laboras en sia ŝvito por havigi al si la necesaĵojn; li perdis la bonaĵojn, kiujn la tero lernis el si mem produkti sen bezono de l' scio de la terkulturisto, kaj li devas senĉese penadi ĉe la serĉado de vivteno, por preventi, ke li mortos pro malsato. **168** Ĉar tion mi pensas: same kiel suno kaj luno ĉiam donas lumon, post kiam tio al ili estis ordonita ĉe la unua estiĝo de l' ĉio kaj ili plenumas la Dian ordonon pro la simpla kialo, ke la malbono estas ekzilita longe for de la limoj de la ĉielo, tiel same la profunda

fekunda tergrundo, sen la scio kaj la laboro de l' terkulturisto, en la diversaj sezonoj prezentis abundajn fruktojn. Sed nun, de post kiam la malbono ekregis la virtojn, blokiĝis la ĉiam fluantaj rojoj de la Diaj bonfaroj, por ke ili ne plu utilu al homoj, kiuj ne estas indaj je ĝi.

Dia kompatemo

169 Nun la homa gento, se la punon kiun ĝi meritis, ĝi jam devus suferi pro la maldankemo al Dio, ĝia bonfaranto kaj savanto, jam devus esti neniigita. Sed Li, kompatema kia Li estas laŭnature, kompatis kaj mildigis la punon. La homan genton Li lasis plu ekzisti, sed la manĝaĵon ne plu disponigis tute pretajn kiel antaŭe, por ke la homo ne, sekve de du malbonoj, nenifarado kaj trosatiĝo, ekscesu en pekoj kaj diboĉado.

170 Jen la vivo de tiuj, kiuj unue vivis en senpekeco kaj simpleco, sed poste preferis la malbonon super la virto.


Finaj konsideroj: Kvin lecionoj

Pere de tiu ĉi traktita historio pri la kreado Moseo instruas nin, krom multaj aliaj aferoj, kvin lecionojn, kiuj estas de escepta beleco kaj mirindaj. – *Unue*: ke Dio ekzistas kaj ĉeestas; tion konsidere la malpiajn, el kiuj kelkaj hezitas kaj estas sendecidaj pri Lia ekzisto, aliaj pli senhonte kuraĝas aserti, ke Li entute ne ekzistas, kaj ke paroli pri Lia ekzisto estas senenhava aserto de homoj, kiuj la veron obskurigas per elpensitaj rakontoj. **171** – *Due*: ke Dio estas Unu: tion pro tiuj, kiuj favoras la instruon de l' politeismo; ili ne fortimiĝas de tio, transporti la plej fian specon de regado – la superregadon de la amaso – de la tero al la ĉielo. – *Trie*: ke, kiel antaŭe mi jam diris, la tero estiĝis; tion pro tiuj, kiuj opinias, ke ĝi estas neestiĝinta kaj eterna, kaj kiuj tial nenion plu havas por atribui al Dio. – *Kvare*: ke ankaŭ la mondo estas unu, ĉar estas nur unu Kreinto, kiu similigis sian kreaĵon al Si mem en la Unu-eco; por la kreo de la tuto Li uzis ĉiun haveblan materion. Ja ne estus unu tutaĵo, se ĝi ne estus estigita kaj kunigita el ĉiuj partoj. Ĉar eĉ ekzistas homoj, kiuj pensas, ke estas pluraj mondoj, ja eĉ, ke ekzistas nemezureble multaj mondoj; tion kaŭzas, ke envere ili estas senfine nesciaj pri tiuj aferoj, pri kiuj estas bone scii ĝin. – *Kvine*: ke Dio zorgas

pri la mondo. Ĉar laŭ la sanktaj leĝoj de l' naturo estas necese, ke la Farinto daŭre zorgu pri sia faraĵo, same kiel parencoj zorgas pri siaj infanoj.

Konkludo

172 Kiu ĉi tiujn mirindajn kaj valorajn ideojn akceptis ne tiom en siajn orelojn kiom en sian spiriton kaj skribis en sian animon – ke estas unu Dio, kiu ĉeestas, kaj ke Li, kiu estas la Vero estas Unu, kaj, ke Li kreis la mondon, kaj, ke Li kreis unu mondon, kiel dirite, ĉar en la unu-eco Li volis ĝin fari simila al Si, kaj, ke Li daŭre zorgas pri sia kreaĵo – tiu havos benatan kaj feliĉan vivon, ĉar en lia interno gravuriĝis la preskriboj de Di-adorado kaj sankteco.





Φίλων ὁ Ἀλεξανδρεὺς

Περὶ τῆς κατὰ Μωυσέα κοσμοποιίας⁴⁶

I

1 Τῶν ἄλλων νομοθετῶν οἱ μὲν ἀκαλλώπιστα καὶ γυμνὰ τὰ νομισθέντα παρ' αὐτοῖς εἶναι δίκαια διετάξαντο, οἱ δὲ πολὺν ὄγκον τοῖς νοήμασι προσπεριβαλόντες ἐξετύφωσαν τὰ πλήθη μυθικοῖς πλάσμασι τὴν ἀλήθειαν ἐπικρύψαντες. **2** Μωυσῆς δ' ἐκάτερον ὑπερβάς, τὸ μὲν ὡς ἄσκεπτον καὶ ἀταλαίπωρον καὶ ἀφιλόσοφον, τὸ δ' ὡς κατεψευσμένον καὶ μεστὸν γοητείας, παγκάλην καὶ σεμνοτάτην ἀρχὴν ἐποίησατο τῶν νόμων, μήτ'

⁴⁶ el: https://el.wikisource.org/wiki/Περὶ_της_κατὰ_Μωυσέα_κοσμοποιίας.

εὐθύς ἅ χρη πρᾶττειν ἢ τούναντίον ὑπειπὼν μήτ', ἐπειδὴ προτυπῶσαι τὰς διανοίας τῶν χρησομένων τοῖς νόμοις ἀναγκαῖον ἦν, μύθους πλασάμενος ἢ συναινέσας τοῖς ὑφ' ἐτέρων συντεθεῖσιν. **3** ἡ δ' ἀρχή, καθάπερ ἔφην, ἐστὶ θαυμασιωτάτη κοσμοποιίαν περιέχουσα, ὡς καὶ τοῦ κόσμου τῷ νόμῳ καὶ τοῦ νόμου τῷ κόσμῳ συνάδοντος καὶ τοῦ νομίμου ἀνδρὸς εὐθύς ὄντος κοσμοπολίτου πρὸς τὸ βούλημα τῆς φύσεως τὰς πράξεις ἀπευθύνοντος, καθ' ἣν καὶ ὁ σύμπας κόσμος διοικεῖται. **4** τὸ μὲν οὖν κάλλος τῶν νοημάτων τῆς κοσμοποιίας οὐδεὶς οὔτε ποιητῆς οὔτε λογογράφος ἀξίως ἂν ὑμνήσαι δύναίτο· καὶ γὰρ ἡ λόγον καὶ ἀκοὴν ὑπερβάλλει μείζω καὶ σεμνότερα ὄντα ἢ ὡς θνητοῦ τινος ὀργάνοις ἐναρμοσθῆναι. **5** οὐ μὴν διὰ τοῦθ' ἡσυχαστέον, ἀλλ' ἔνεκα τοῦ θεοφιλοῦς καὶ ὑπὲρ δύναμιν ἐπιτολμητέον λέγειν, οἴκοθεν μὲν οὐδέν, ὀλίγα δ' ἀντὶ πολλῶν, ἐφ' ἃ τὴν ἀνθρωπίνην διάνοιαν φθάνειν εἰκὸς ἔρωτι καὶ πόθῳ σοφίας κατεσχημένην. **6** ὡς γὰρ τῶν κολοσσιαίων μεγεθῶν τὰς ἐμφάσεις καὶ ἡ βραχυτάτη σφραγὶς τυπωθεῖσα δέχεται, οὕτως τάχα που καὶ τὰ τῆς ἀναγραφείσης ἐν τοῖς νόμοις κοσμοποιίας ὑπερβάλλοντα κάλλη καὶ ταῖς μαρμαρυγαῖς τὰς τῶν ἐντυγχανόντων ψυχὰς ἐπισκιάζοντα βραχυτέροις παραδηλωθήσεται χαρακτηῖσιν, ἐπειδὴν ἐκεῖνο μνηυθῆ πρότερον, ὅπερ οὐκ ἄξιον ἀποσιωπῆσαι.

II

7 Τινὲς γὰρ τὸν κόσμον μᾶλλον ἢ τὸν κοσμοποιὸν θαυμάσαντες τὸν μὲν ἀγέννητόν τε καὶ αἰδίδιον ἀπεφήναντο, τοῦ δὲ θεοῦ πολλὴν ἀπραξίαν ἀνάγκως κατεψεύσαντο, δέον ἔμπαλιν τοῦ μὲν τὰς δυνάμεις ὡς ποιητοῦ καὶ πατρὸς καταπλαγῆναι, τὸν δὲ μὴ πλέον ἀποσεμνῦναι τοῦ μετρίου. **8** Μωυσῆς δὲ καὶ φιλοσοφίας ἐπ' αὐτὴν φθάσας ἀκρότητα καὶ χρησιμοῖς τὰ πολλὰ καὶ συνεκτικώτατα τῶν τῆς φύσεως ἀναδιδαχθεὶς ἔγνω δὴ, ὅτι ἀναγκαιότατόν ἐστιν ἐν τοῖς οὔσι τὸ μὲν εἶναι δραστήριον αἴτιον, τὸ δὲ παθητόν, καὶ ὅτι τὸ μὲν δραστήριον ὁ τῶν ὄλων νοῦς ἐστιν

είλικρινέστατος καὶ ἀκραιφνέστατος, κρείττων ἢ ἀρετὴ καὶ κρείττων ἢ ἐπιστήμη καὶ κρείττων ἢ αὐτὸ τὸ ἀγαθὸν καὶ αὐτὸ τὸ καλόν, **9** τὸ δὲ παθητὸν ἄψυχον καὶ ἀκίνητον ἐξ ἑαυτοῦ, κινήθην δὲ καὶ σχηματισθὲν καὶ ψυχωθὲν ὑπὸ τοῦ νοῦ μετέβαλεν εἰς τὸ τελειότατον ἔργον, τόνδε τὸν κόσμον· ὃν οἱ φάσκοντες ὡς ἔστιν ἀγέννητος λελήθασιν τὸ ὠφελιμώτατον καὶ ἀναγκαιότατον τῶν εἰς εὐσέβειαν ὑποτεμνόμενοι τὴν πρόνοιαν. **10** τοῦ μὲν γὰρ γεγονότος ἐπιμελεῖσθαι τὸν πατέρα καὶ ποιητὴν αἰρεῖ λόγος· καὶ γὰρ πατὴρ ἐκγόνων καὶ δημιουργὸς τῶν δημιουργηθέντων στοχάζεται τῆς διαμονῆς καὶ ὅσα μὲν ἐπιζήμια καὶ βλαβερὰ μηχανῆ πάση διωθεῖται, τὰ δὲ ὅσα ὠφέλιμα καὶ λυσιτελῆ κατὰ πάντα τρόπον ἐκπορίζει ἐπιποθεῖ· πρὸς δὲ τὸ μὴ γεγονὸς οἰκείωσις οὐδεμία τῷ μὴ πεποιηκότι. **11** ἀπεριμάχητον δὲ δόγμα καὶ ἀνωφελὲς ἀναρχίαν ὡς ἐν πόλει κατασκευάζον τῷδε τῷ κόσμῳ τὸν ἔφορον ἢ βραβευτὴν ἢ δικαστὴν οὐκ ἔχοντι, ὑφ' οὗ πάντ' οἰκονομεῖσθαι καὶ πρυτανεύεσθαι θέμις. **12** ἀλλ' ὅ γε μέγας Μωυσῆς ἀλλοτριώτατον τοῦ ἰδίου νομίσας εἶναι τὸ ἀγέννητον – πᾶν γὰρ τὸ αἰσθητὸν ἐν γενέσει καὶ μεταβολαῖς οὐδέποτε κατὰ ταῦτα ὄν – τῷ μὲν ἀοράτῳ καὶ νοητῷ προσένειμεν ὡς ἀδελφὸν καὶ συγγενὲς αἰδιότητα, τῷ δ' αἰσθητῷ γένεσιν οἰκεῖον ὄνομα ἐπεφήμισεν. ἐπεὶ οὖν ὀρατός τε καὶ αἰσθητὸς ὁδε ὁ κόσμος, ἀναγκαίως ἂν εἴη καὶ γενητός· ὅθεν οὐκ ἀπὸ σκοποῦ καὶ τὴν γένεσιν ἀνέγραψεν αὐτοῦ μάλα σεμνῶς θεολογήσας.

III

13 Ἐξ δὲ ἡμέραις δημιουργηθῆναί φησι τὸν κόσμον, οὐκ ἐπειδὴ προσεδεῖτο χρόνων μήκους ὁ ποιῶν – ἅμα γὰρ πάντα δρᾶν εἰκὸς θεόν, οὐ προστάττοντα μόνον ἀλλὰ καὶ διανοούμενον – , ἀλλ' ἐπειδὴ τοῖς γινομένοις ἔδει τάξεως. τάξει δὲ ἀριθμὸς οἰκεῖον, ἀριθμῶν δὲ φύσεως νόμοις γεννητικώτατος ὁ ἕξ· τῶν τε γὰρ ἀπὸ μονάδος πρῶτος τέλειός ἐστιν ἰσοῦμενος τοῖς ἑαυτοῦ μέρεσι καὶ συμπληρούμενος ἐξ αὐτῶν, ἡμίσεος μὲν τριάδος, τρίτου δὲ

δυάδος, ἕκτου δὲ μονάδος, καὶ ὡς ἔπος εἶπεῖν ἄρρην τε καὶ θῆλυς εἶναι πέφυκε κάκ τῆς ἐκατέρου δυνάμεως ἤρμοσται· ἄρρεν μὲν γὰρ ἐν τοῖς οὖσι τὸ περιττόν, τὸ δ' ἄρτιον θῆλυ· περιττῶν μὲν οὖν ἀριθμῶν ἀρχὴ τριάς, δυὰς δ' ἀρτίων, ἢ δ' ἀμφοῖν δύναμις ἐξάς.

14 ἔδει γὰρ τὸν κόσμον τελειότατον μὲν ὄντα τῶν γεγονότων κατ' ἀριθμὸν τέλειον παγῆναι τὸν ἕξ, ἐν ἑαυτῷ δ' ἔχειν μέλλοντα τὰς ἐκ συνδυασμοῦ γενέσεις πρὸς μικτὸν ἀριθμὸν τὸν πρῶτον ἀρτιοπέριττον τυπωθῆναι, περιέξοντα καὶ τὴν τοῦ σπείροντος ἄρρενος καὶ τὴν τοῦ ὑποδεχομένου τὰς γονὰς θήλεος ιδέαν. **15** ἐκάστη δὲ τῶν ἡμερῶν ἀπένειμεν ἕνια τῶν τοῦ παντός τμημάτων τὴν πρώτην ὑπεξελόμενος, ἦν αὐτὸς οὐδὲ πρώτην, ἵνα μὴ ταῖς ἄλλαις συγκαταριθμῆται, καλεῖ, μίαν δ' ὀνομάσας ὀνόματι εὐθυβόλῳ προσαγορεύει, τὴν μονάδος φύσιν καὶ πρόσρησιν ἐνιδῶν τε καὶ ἐπιφημίσας αὐτῇ.

IV

λεκτέον δὲ ὅσα οἷόν τέ ἐστι τῶν ἐμπεριεχομένων, ἐπειδὴ πάντα ἀμήχανον· περιέχει γὰρ τὸν νοητὸν κόσμον ἐξαίρετον, ὡς ὁ περὶ αὐτῆς λόγος | μηνύει. **16** προλαβὼν γὰρ ὁ θεὸς ἄτε θεὸς ὅτι μίμημα καλὸν οὐκ ἂν ποτε γένοιτο δίχα καλοῦ παραδείγματος οὐδέ τι τῶν αἰσθητῶν ἀνυπαίτιον, ὃ μὴ πρὸς ἀρχέτυπον καὶ νοητὴν ιδέαν ἀπεικονίσθη, βουληθεὶς τὸν ὁρατὸν κόσμον τουτονὶ δημιουργῆσαι προεξετύπου τὸν νοητὸν, ἵνα χρώμενος ἀσωμάτῳ καὶ θεοειδεστάτῳ παραδείγματι τὸν σωματικὸν ἀπεργάσῃται, πρεσβυτέρου νεώτερον ἀπεικόνισμα, τοσαῦτα περιέξοντα αἰσθητὰ γένη ὅσαπερ ἐν ἐκείνῳ νοητά.

